

(EN ESPERANTO)

ISSN 0032-4361

11

1994

中國新聞

EL POPOLA

ĈINIO





Vivforto

Foto de YAN JIN

INTER NI

Mia adreso publikigita en "EPĈ" antaŭ du jaroj alportis al mi 68 korespondantojn el 27 landoj de kvar kontinentoj, kaj mi respondis al ili ĉiuj. Al ĉi tiu grandega suk-

ceso mi laŭdas la fame konatan EPĈ, mian karan revuon, kiu faras parton de mia vivo. Mi deziras al EPĈ daŭran sukceson kaj eternan ekziston.

ALICE AMALIA KLEIN
(Brazilo)

Ŝajnas al ni, ke iom post iom vi komencas skribi pli analize ol antaŭe ekz. pri sociaj kaj ekonomiaj aferoj. Kial nur laŭdi, ĉar ĉiu prudenta homo scias aŭ divenas, ke ankaŭ Ĉinio havas ĉiurilate multe da problemoj. Bone, vi kuraĝis skribi artikolon pri kamparaj senlaborecoj kaj same klarigis la kialojn de senlaboreco en kamparaj regionoj.

AIRA kaj ERKKI RÖNTYNNEN
(Finnlando)

En via revuo mankas romanoj skribitaj eĉ fragmente en ĉiu numero, mankas ankaŭ belaj ĉinaj fabeloj, kiuj estas belegaj ne nur por maturaj legantoj, sed antaŭ ĉio por infanoj. Se la revuo enhavas iajn novelojn aŭ fabelojn, mi legos ilin eĉ multfoje kaj poste rakontos al miaj genepoj.

PERZAK ANIELA
(Pollando)

Por plimultigi abonantojn, mi faris senpagajn kursojn en mia malriĉa loĝejo. Bedaŭrinde mi malsukcesis aŭ ne povis sukcesi tiel, kiel mi deziris. La kaŭzo kuŝas kompreneble en tio, ke mia kara patrolando ne havas bonan staton.


ZORKA ILIJIN
(Jugoslavio)

ENHAVO

- 2 *INTERNI*
 4 Monda kongreso, azia festivalo
 6 Pri la kongresa temo de la 79-a UK
 8 Esperanto kaj scienc-teknika interŝanĝo
 9 Verda karavano
 10 *ESP-NOVAĴOJ*
 13 *SUR NIA LIBROBRETO:*
 Dekunu paroladetoj pri Pekoteko
 14 *POR KOMENCANTOJ:*
 La sentoplenaj homoj
 15 *EKONOMIE:*
 La tuta socio zorgu pri agrikulturo
 16 *ĈINA KULTURO:*
 Luna kalendaro ŝatata de ĉinaj kamparanoj
 20 *ĈE YANGZI-RIVERO:*
 Pri la Projekto de la Tri Gorĝoj
 24 En folkloraj amuzejoj de Pekino
 26 *SUR SCENEJO:*
 "La Traviata" en Ĉinio
 28 *EL ĈINAJ GAZETOJ*
 29 *BELA ĈINIO:*
 La unua pasejo de la Granda Muro
 32 Lulilo de sportaj ĉampionoj
 36 Rakonto pri kuracistino
 37 *POR VIA SANO:*
 Masaĝo en la ĉiutaga vivo (II)
 38 Mark Baber en ĉina malliberejo
 39 Biovenenoj utiligeblaj
 40 Nova vivo de toksigemuloj
 41 *KORESPONDI DEZIRAS*
 42 Pluvo sudĉinia (Poemo)
 43 *SENTENCOJ DE FILOZOFOJ:*
 Sentencoj de Guan Zhong
 43 *MEM PROVU*
 46 Ŝtala uzino reviviĝinta sur ruino
 48 *KURANTAJ AFEROJ*
 50 *METIARTAĴOJ:*
 Kokosa skulpturo
SUR LA KOVRILLO:
 Dancistino Foto de **Song Shijing**
 2 Vivforto
 34 La nova turisma marbordo Nandaihe
 44 Floras nacia muziko
SUR LA DORSKOVRILO:
 [FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ]

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Tai'an (p. 46)
2. Changzhi (p. 36)
3. Ŝanhaj-pasejo (p. 29)
4. Zheĵiang-provinco (p. 32)
5. Hainan-provinco (p. 50)



Monda kongreso,

— Pri la 79-a

UNIVERSALA Kongreso de Esperanto, la plej granda evento en Esperantujo, plejofte okazis en Eŭropo. Antaŭ 1994 okazis en Azio nur du UK, nome la 50-a UK en Tokio en 1965 kaj la 71-a UK en Pekino en 1986. En la kongresoj okazigitaj en Eŭropo kaj Ameriko aziaj esperantistoj ĉiam estis minoritataj. Tiun staton rezultigis multflankaj kaŭzoj. Efektive en Azio troviĝas multe da esperantistoj. Precipe en la lastaj dek jaroj la azia E-movado rapide progresis. Aziaj esperantistoj ege deziris okazigi plian UK en Azio por montri la azian movadon al la mondo.

Jen venis la tempo. Okaze de la 600-a jubileo de la ĉefurbiĝo de Seulo, la 79-a Universala Kongreso de Esperanto prenis Seulon kiel sian kongresurbon.

Por sukcese okazigi tiun ĉi kongreson, koreaj esperantistoj zorgeme faris preparadon. Ili ricevis ne nur pozitivan ĉhon de aliaj aziaj landoj, sed ankaŭ grandan subtenon de la korea registaro. Hwang Nakjoo, prezidanto de la Korea Nacia Asembleo, postenis kiel alta protektanto de la kongreso, kaj Kang Young-hoon, prezidanto de la Korea Nacia Ruĝa Kruco kaj eksa ĉefministro, kiel prezidanto de la honora komitato de la kongreso.

La kongresejo troviĝis en la kvin-stela hotelo Sheraton Walker Hill ĉe la rivero Han. La solena inaŭguro komenciĝis je la 10-a de la 24-a de julio en la halo Zamenhof. Ĝin partoprenis pli ol 1 700 esperantistoj el 66 landoj, inter kiuj estis 14 aziaj landoj, inkluzive de Mongolio kaj Kamboĝo, kies esperantistoj unua-

foje aperis en UK. La nombro de la azianoj konsistigis grandan parton de la kongresanoj kaj sole la kongresanoj el Japanio, Koreio kaj Ĉinio superis 1 000.

Tuj post la inaŭguro, novaĵoj pri la kongreso vaste informiĝis en la koreaj amaskomunikiloj. Ĉefaj koreaj ĵurnaloj kaj gazetoj publikigis artikolojn pri Esperanto kaj la kongreso. Tio sendube kontribuis multe por diskonigi Esperanton en Koreio.

Same kiel la pasintaj kongresoj, ankaŭ la kongreso estis abunda je programoj. Ĉiutage oni zorge legis la kongresan libron kaj la kongresan kurieron por elekti siajn ŝatatajn programerojn. Jen "Cseh-arangoj", "Konversaciaj Rondoĵoj", "Internaciaj Ekzamenoj de UEA kaj ILEI", "Korea Eksprese", "Esperantologia Konferenco", "Tago de la Libro", "Tago de la Lernejo", "UEA-kunsidoj", "kunsidoj de legantoj de *Esperanto*, *El Popola Ĉinio* kaj *La Espero el Koreio*", kunsidoj pri regionaj kaj fakaj agadoj kaj tiel plu. Tiuj programeroj donis al la kongresanoj vastan agadkampon, en kiu oni povas diskuti Esperanton kaj E-movadon, diskuti kiel progresigi lokan kaj fakan agadojn, kaj ankaŭ riĉigi siajn lingvajn sciojn.

Por alilandaj esperantistoj, la revuo "El Popola Ĉinio" ĉiam funkcias kiel fenestro por koni Ĉinion. Por plibonigi redaktadon kaj distribudadon de la revuo, la redakcio okazigis kunsidon kun siaj legantoj. La kunsidon prezidis s-ro Zou Guoxiang, vicĉefredaktoro de EPC. Mi parolis pri arango de rubrikoj kaj artikoloj rilate al Esperanto por la venonta jaro, esperante, ke niaj legantoj kontribuos por la revuo. Pluraj fervoraj

legantoj faris parolon pri la revuo kaj prezentis bonajn proponojn. Dum la kongreso laboris EPC-giĉeto, ĉe kiu 80 kongresanoj abonis la revuon.

Dum la kongreso okazis dufoje kunsido pri la azia agado. Por plue antaŭenigi la azian movadon, en la kunsido elektiĝis Komitato pri Azia Esperanto-movado, kiu konsistas el 5 aziaj esperantistoj. Tiuj nove elektitaj komitatanoj kunsidis por diskuti alfrontitajn problemojn de la azia movado, kaj proponis ke la Unua Azia Kongreso de Esperanto okazu en Ĉinio, 1996.

En la Tago de la Lernejo, sesdeko da kongresanoj kunvenis por interŝanĝi spertojn kaj informojn en E-instruado. Por instrui Esperanton al infanoj, Internacia Esperanto-Instituto estas produktanta novan vidbendon. S-ro Roman Dobrzynski prezentis la projekton kaj montris parton jam preparitan de animita televida lingvokurso "Mazi en Gondolando". La vidbendo ricevis aplaudon de la ĉeestantoj.

Tamen ĝuste kiel John C. Wells, prezidanto de UEA, diris en la inaŭguro, la ĉefa celo de UK ne estas diskuti Esperanton, nek E-movadon, kvankam tion ni faros. La celo estas praktika: uzi Esperanton.

Dum la kongreso oni diskutis en Esperanto gravajn temojn, el kiuj la ĉefa estas la kongrestemo "Azio en la mondo". Dum la 47-a sesio de Internacia Kongresa Universitato oni aŭskultis 8 prelegojn, el kiuj 5 estis faritaj de aziaj esperantistoj. S-ro Liu Caisheng, redaktoro de EPC, faris prelegon titolitan "La Silka Vojo", kiu vekis ĉe la aŭskultantoj grandan intereson kaj ricevis

azia festivalo

UK en Seulo



bonan takson. La loka komitato de la kongreso ankaŭ aranĝis 4 prelegojn pri ekonomio, medicino, kulturo kaj historio de Koreio, por ke la kongresanoj pli multe konu Koreion.

Ankaŭ la Tago de la Paco kaj fakkunsido de Omoto estas sukcesaj ekzemploj por praktiki Esperanton. Uzi Esperanton povas ne nur havigi al ni pli multajn informojn, sed ankaŭ montri la vivipovon de Esperanto.

En la kongreso ne mankis ankaŭ artaj aranĝoj, kiuj malstreĉis la kongresanojn. La artaj programeroj elspiris fortan orientan koloron. La kongresanoj vivis en la atmosfero de la orienta kulturo.

La filmo "Manpleno da tempo" kun Esperantaj surskriboj montris al kongresanoj la korean kinarton. Senvorta, tamen forte kortuŝa pupteatro kondukis kongresanojn en la korean socion de la 30-aj jaroj. La korea nacia spektaklo donis la ŝancon al kongresanoj apreci la muzikan kaj dancan artojn de Koreio.

Estis aplaŭditaj en la kongreso ankaŭ prezentado de Emily Barlaston kaj teatro de Vida Jerman. La adiaŭa koncerto fariĝis internacia arta vespero. Esperanto interligas homojn de malsamaj nacioj, kredoj kaj kulturoj, ke ili amikiĝu kaj interkomprenu unu alian.

Se oni diras, ke tiu ĉi kongreso havas fortan azian koloron, do ni esperas, ke venontaj UK havos ne nur la eŭropan, azian aŭ amerikan koloron, sed ankaŭ afrikan karakteron. Tiam la internacieco kaj grava rolo de Esperanto pli klare montriĝos. ■



Kongresanoj kantas Esperante.

Kamboĝa esperantisto (dekstre) unuafoje en la kongreso



Pri la kongresa temo de la 79-a UK

AZIO estas la plej granda kontinento en la mondo. Tie vivas pli ol duono de la homaro. La basenoj de la Flava Rivero, Gango, Tigriso kaj Eŭfrato estis luliloj de la homa civilizacio. Azianoj faris gravajn kontribuojn al la civilizita historio de la homaro. En la lastaj 20-30 jaroj la ekonomio de Azio rapide disvolviĝis. Japanio nun estas la dua ekonomia potenco de la mondo. La tiel nomataj kvar drakoj Hongkong, Taiwan, Singapuro kaj Korea Respubliko multe evoluis ekonomie. La reformado kaj pordmalfermo de Ĉinio portis rimarkindajn sukcesojn al la ĉina popolo kaj vekis grandan atenton ĉe la monda publiko. Oni diras, ke la 19-a jc. apartenis al Eŭropo, la 20-a jc. estas tiu de Usono kaj la 21-a jc. verŝajne estos tiu de Azio. En Azio prosperas ankaŭ Esperantomovado. La seula kongreso estas la 3-a UK okazinta en Azio. Eble ĝuste pro tio la 79-a Universala Kongreso de Esperanto prenis "Azio en la mondo" kiel sian kongresan temon.

Tamen la amplekso de la kongresa temo estas tia, ke ne eblas ĝisfunde trakti ties plurajn aspektojn. Tial la kongresaj laboroj koncentriĝis je jenaj 5 subtemoj:

1. Ekonomiaj perspektivoj;
2. Hierarkiaj socioj;
3. Kultura pluralismo en Azio;
4. Aziaj esperantejoj;
5. Historiaj aspektoj.

Mi partoprenis tri Universalajn Kongresojn kaj ĉi-foje kun kontento rimarkis, ke la kongresa temo estis diskutita plej multe. Ne nur la kongrestemaj laborgrupoj, sed ankaŭ aliaj kunsidoj multe diskutis

pri ĝi. La kongreso elspiris klarajn aziajn karakterojn. En la Internacia Kongresa Universitato estis 8 prelegoj, el kiuj 5 estis faritaj de azianoj. Kaj la unua prelego havas la titolon "Rolo de Azio en la Mondo" farita de prof. Lee Chong-Yeong. Ankaŭ la Tago de la Paco centris en si la temon.

Prof. Lee Chong-Yeong diris en sia prelego: "En la 21-a jc. ekonomio regos politikon kaj militforton. En kulturaj aferoj, Azio influos la mondon pli multe ol en la pasinteco, sed ne tiel forte ol ekonomia influo, ĉar la okcidenta kulturo jam fariĝis la dominanta forto de la mondo, kvankam la kulturaj naciismoj kontraŭas invadon de la okcidenta kultura regado. Azio devas montri sian gvidforton ne nur en ekonomio, sed ankaŭ en morala aspekto"

Ĝenerale dirite, oni nun dediĉas grandan atenton al la ekonomia disvolviĝo, tial ankaŭ en la UK oni multe parolis pri tio. Prof. Lee Chong-Yeong traktis la ekonomian pozicion de Azio en la mondo. Li diris: "En 1950 Usono okupis 35% de la tutmonda produkto, sed en 1990 ĝi malgrandiĝis al 23%. Male, Azio okupis nur 18% de la tutmonda produkto en 1950, sed ĝi grandiĝis al 25% en 1990."

Estas tre interesa la tezo de prof. Lee. Li diris: "Nun Ĉinio estas en la procedo de merkato de sia ekonomio, subtenate de la aŭtoritata politika formo. En la procedo la registaro ofte kontraŭas la premadon por rapida demokratiigo de la politika sistemo. Ŝajnas, ke la prioritato de la ĉina registaro estas en ekonomia disvolviĝo, kaj por tiu celo Ĉinio deziras havi stabilan



La aŭtoro prelegas en la kongreso.

registaron sub la aŭtoritata regado. La kvar drakoj, Hongkong, Taiwan, Singapuro kaj Korea Respubliko, kiuj estas influataj de konfuceanisma instruo, sukcesis laŭ la sama politiko. Kial ĝi ne sukcesos en Ĉinio, la naskiĝlando de konfuceanismo?"

Kontraŭe al areto da japanaj politikistoj, kiuj obstinas en senkulpigo de la japanaj militaristoj en la Dua Mondmilito, s-ro Deguchi Kyotaro, prezidanto de Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto, faris prelegon kun titolo "Azio en la mondo". En sia prelego li diris: "Japanio, unu el la aziaj landoj, estis pritrudita de grandaj regnoj en Eŭropo kaj Usono per malegalrajta traktado dum la periodo de la lastaj jaroj de Ŝoeguneco ĝis la komenco de Meiji-epoko (ĉirkaŭ 1853-1900). Sed Japanio post Meiji-epoko fariĝis agresanto sama kiel la grandaj regnoj en Eŭropo kaj Usono kontraŭ aliaj landoj en Azio, kaj donis suferon al multaj ŝtatoj kaj nacioj. Interalie, kontraŭ Koreio ĝi faris tiom da malhumanaĵoj, kiom ĝi povis; ekzemple, okazis granda invado de Tojotomi Hidejoŝi (proksimume fine de



1500-aj jaroj), kaj post la epoko Meiji Japanio invadis, subpremis, ekspluatis kaj kruelis senindulge, kaj fine ĝi deprenis eĉ la lingvon... Grave agnoskante ĉi tiujn faktojn, historion kaj grandajn kulpojn, ni elkore pardonpetas al multaj landoj kaj nacioj. Samtempe ni kunĵuras en la koro, ke ni faru nian plejbonon por neniam plu ripeti tiajn aferojn... Ni, oomotanoj, ricevis du subpremeĝojn ĝis la Dua Mondmilito fare de japanaj militarismo kaj registaro; pere de tiutempaj doloro kaj sufero ni povas senti, eĉ se iomete, la tragikon kaj akran doloron de ĉiuj koncernatoj..."

Evidente, paco kaj stabileco estas dezirataj de la tuta mondo kaj precipe de la aziaj popoloj, kiuj unuanime faras la ekonomian konstruadon.

Ankaŭ en la Tago de la Paco oni diskutis pri la kongresa temo. Mark Fettes, nova ĝenerala sekretario de UEA, diris, ke oni atendas de Azio pli kaj pli grandan influon al la direkto, en kiu disvolviĝos la pacmekanismoj kreitaj de neaziaj landoj post la Dua Mondmilito. Surbaze de multjaraj spertoj kiel ambasadoro de Aŭstralio ĉe UN, s-ro Ralph Harry traktis la ses kampojn difinitajn en la Ĉarto de UN kiel tiujn, sur kiuj baziĝas la mondpaĉo. Temas pri la sendependigado de koloniitaj popoloj, la reunuigado de dividitaj popoloj, la alĝustigado de landlimo, la stimulado de ekonomio, la malarmado kaj la plifortigado de la rajtoj de individuoj. Azio nun povas kontribui pli ol iam antaŭe al la malperforta solvo de pacrilataj problemoj, kaj Esperanto povas ankoraŭ funkcii kiel neŭtrala perilo de la vero.

Ankaŭ en la kultura interŝanĝo nia lingvo povas ludi pli grandan rolon. La 28-an de julio s-ro Gotoo Hitosi, japana samideano, gvidis laborgrupon 3 kadre de la kongresa temo, rilate al la diverseco de aziaj kulturoj. Oni diskutis pri la eblo de Esperanto funkcii kiel ponto super la baro de diverseco inter la aziaj kulturoj. Evidentiĝis manko de kulturaj kaj informaj interŝanĝoj inter la aziaj kulturoj, kontraste al relative densa interŝanĝo inter la kulturoj eŭropa kaj azia. Estis proponitaj kelkaj rimedoj por ŝtopi tiun informo-breĉon pere de Esperanto: plioftigi renkontiĝon, dediĉi kelkajn partojn de Esperanto en Azio al tiu celo, interŝanĝi kulturajn gazetojn.

La kongresa temo 4 estis diskuto pri la temo: "Kio estas Esperanto por ni en Azio?" gvidita de s-ino Doi Ĉieko, redaktoro de "Esperanto en Azio". En la diskuto montriĝis diferenco de motivoj inter azianoj kaj eŭropanoj, per kiuj ili daŭrigas Esperanto-movadon. En eŭropaj landoj junuloj eklernas Esperanton kiel ŝatokupon por havi rektan kontaktiĝon, dum maljunaj esperantistoj ankoraŭ tenas sian idealon pri Esperanto. La idealo kaj ĝia disvastigo ŝajnas al eŭropaj junuloj eksmodaj. Laŭ ilia opinio, por informado de Esperanto, parolo pri la idealo estas evitinda. Tamen dum sufiĉe longa tempo la idealo tenis la Esperanto-movadon. En aziaj landoj esperantistoj ankoraŭ pli serioze traktas Esperanton. Pro diverseco de aziaj landoj ankaŭ Esp-movado en Azio tre diversas. En evoluantaj aziaj landoj oni eklernas Esperanton por havi amikecon kun alilandanoj kaj praktikas la lingvon. Sed en evoluantaj landoj oni havas tro malmultajn ŝancojn praktiki Esperanton. Tamen homoj lernas Esperanton kun la espero, ke iam estonte ili povos praktiki la lingvon.

Dum la kongresaj tagoj estis tre viglaj ankaŭ la kunsidoj pri Azia Agado. Reprezentantoj de esperantistoj de kelkaj aziaj landoj interkonsiliĝis pri fondo de Azia Esperanto-Komitato kun celo oka-



S-ro Lee Chong-Yeong en prelego

zigi Azian Kongreson de Esperanto, por ke azianoj pli ofte kongresu por praktiki Esperanton. Multaj aprobis tiun proponon, kvankam estis diversaj problemoj solvendaj.

Jen tekstas la kongresa rezolucio pri la kongresa temo:

La 79-a UK diskutinte la temon "Azio en la Mondo" inter la 23-a kaj la 30-a de julio 1994 en Seulo, Korea Respubliko, en la KUNTEKSTO DE LA KRESKANTA GRAVECO de la landoj aziaj kiel agantoj sur la monda podio,... NOTAS KUN KONTENTO la atingojn de la orientaziaj Esperanto-movadoj; RIMARKAS la familiecan socian strukturon, sur kiu baziĝas la lastatempa ekonomia sukceso de pluraj aziaj landoj, kaj la parencecon inter tiu stilo kaj nia pledado por la uzo de neŭtrala lingvo en la granda homa familio; KONSTATAS KUN ĜOJO la kreskantan emon de la aziaj socioj ekster la okcidentaj amaskomunikiloj; EMFAZAS, ke malgraŭ la finiĝo de la koloniismo, persistas la hegemonio de la ekskoloniaj lingvoj kaj kulturaj fonoj, kaj ke la lukto por pli ekvilibra prezento en la lernolibroj de ĉiuj landoj de la aziaj kontinentoj al la monda racio kaj kulturo estas natura aliancano de nia strebado al racia lingva ordo ebliganta senperajn, egalajn kontaktojn inter la homoj kaj GRATULAS tiujn aziajn esperantistojn, kiuj avangarde rolas en ĉi tiu regiona solidariĝado kaj dankas al tiuj ne-azianoj, kiuj solidare helpas en ĉi tiu klopodo. ■


WANG HANPING:

Esperanto kaj scienc-teknika interŝanĝo

LA Kvara Internacia Akademia Konferenco de Sciencoj kaj Teknikoj en Esperanto solene inaŭguriĝis la 11-an de julio 1994 en la Centra Nacia Universitato de Pekino. Pli ol mil esperantistoj de Aŭstralio, Belgio, Finnlando, Francio, Germanio, Japanio kaj Ĉinio partoprenis la inaŭguron.

La inaŭguron prezidis Zhou Mingzhen, membro de la Ĉina Akademio de Sciencoj, paleontologo kaj konsilanto de la Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj. Hu Qiheng, vicprezidanto de la Ĉina Akademio de Sciencoj, donis inaŭguran parolon. Ŝi diris, ke ekde sia naskiĝo Esperanto jam estas esperdona lingvo. Oni esperas, ke ĝi fariĝos ege utila komunikilo en la internacia kontaktiĝo. Ĝi

La aŭstralia profesoro P. K. SMRZ salutas la inaŭguron.



En la inaŭguro

povas forigi lingvan baron, akceli mondpacon, unuiĝon kaj kunlaboron kaj ankaŭ servi al la pordomalfermo kaj scienc-teknika disvolviĝo de Ĉinio. La inaŭguron ĉeestis ankaŭ Lu Jiaxi (Lu Ĝjaŝji), vicprezidanto de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, Hu Zhaoguang, vicurbestro de Pekino, kaj famaj sciencistoj de la Ĉina Akademio de Sciencoj.

La temo de la konferenco estis "Scienco, Tekniko kaj Nova Jarcento". Nia mondo iras al la 21-a jarcento plena de scienc-teknikaj kreaĵoj kaj inventoj, kiu faros al ni diversajn kaj neimageblajn defiojn.

La konferenco temis pri scienco, tekniko, ekonomio, medicino, kulturo, Esperanta instruado kaj aliaj. Multaj esperantistoj ĉinaj kaj alilandaj legis sian disertaĵon. Ankaŭ iuj famaj sciencistoj parolis en la konferenco. S-ro Saionji Masayuki de la Japana Internacia Instituto pri Praktiko de Preventa Medicino prelegis pri masaĝo por reĝustigi la pelvon. S-ino Margarete Bettemann el Germanio prelegis pri naturterapio, konata kiel Tempa Trako. La prelegoj estis bonvenaj al la ĉeestantoj.

La konferenco honoris per premio de verdstela scienc-teknika progreso 7 ĉinajn kaj alilandajn esperantistojn, kiuj kontribuis per Esperanto al scienc-teknika progreso kaj interŝanĝo.

La partoprenantoj ne nur faris akademian interŝanĝon, sed ankaŭ konatiĝis kun novaj amikoj.

La konferenco fermiĝis antaŭtagmeze de la 17-a de julio. La sekvanta konferenco okazos en 1996 en Pekino. Dum la konferenco estos internacia somera semajno de infanoj. ■



S-ino Tan Xiuzhu (dekstre staranta), vicĉefredaktorino de EPC, konigas la revuon al la verda karavano.



S-ro Yu Tao (maldekstre), prezidanto de la Ĉina Junulara E-Asocio, kunsidas kun la verda karavano.

LAŬLUM:

Verda karavano

En ŝvitiga tago, la 26-a de julio, pekinaj geesperantistoj akceptis en la saloneto de la redakcio de “El Popola Ĉinio” verdan karavanon el 28 gejunuloj el Aŭstralio, Aŭstrio, Svedio, Belgio, Britio, Danlando, Finnlando, Francio, Germanio, Italio, Nederlando kaj Svisio. Tiu internacia avano de Esperanto renkontis en Moskvo kaj Siberio Esperantajn rondojn vigligante nian movadon, inkluzive tiun en la juniganta antikva urbo Pekino. Ĝia celo estas ĉeesti la junularan kongreson en Koreio.

*Amike migras tra la mondo,
junula verda karavano,
gastadas ĝi ĉe rond' post rondo,
vigladas l' Esperant-avano.*

*Tra Siberio al Pekino
marŝadas ŝvite l' gebravuloj,
kun energio kaj obstino
movante multajn per stimuloj.*

*Pekinaj juli-tagoj varmas,
la karavano ne ripozas.
En salonet' amaso svarmas,
parolaj paroj pri-eposas.*

*Sen ŝpar' de ŝvito kaj cerbumo,
aktivas ĉiu de l' avano,
kun nova sento, por plenumo
de l' celo de la karavano.*

La 26-an de jul. Pekino

ESP-NOVAĴOJ

● En la 4-a Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto okazinta en Pekino julie de 1994, veterana esperantisto Qin Kaiji (Ĉin Kajĝji), konstanta konsilanto de la Ĉina Filatela E-Asocio, eksponis siajn Esperantajn filatelaĵojn.

● La 15-an de aprilo 1994 (Nepala Novjaro) oni starigis Esperantan monumenton en vilaĝo 150 km. norde de Katmanduo. Sur la monumento legiĝas la frazo “La paco regu la mondon” en la lingvoj Esperanta, nepala, angla kaj japana.



Esperanta monumento en Nepalo

● La Filio de Pola Esperanto-Asocio en Glivice multe agadis dum la pasintaj monatoj. Jen ilia aktivado: 1. La 29-an de januaro 1994 estis organizita “novjara oblato”, kiun partoprenis, krom glivicaj esperantistoj, ankaŭ tiuj el aliaj urboj, oni kantis kristnaskajn kantojn kaj travivis religiajn kaj amikajn momentojn. 2. La 25-an de februaro prezidanto de Glivica E-Klubo estis invitita al la loka radio “Puls”, kaj respondis demandojn pri Esperantomovado en la urbo kaj atingiĝoj de la internacia lingvo. La in-

tervjuo daŭris preskaŭ unu horon kaj kelkaj aŭskultantoj demandis telefone pri Esperanto dum la disaŭdigo. 3. De la 21-a ĝis la 28-a de majo la klubo organizis regionan filatelan ekspozicion kune kun Filio de Polaj Filatelistoj. Koverton kun speciala poŝtstampo (nur pollingva) kontraŭ 1 irk aŭ alia E-filatelaĵo oni povas ricevi ĉe: ESPERANTO, skr. poczt 21, 44-100 Glivice, Pollando. 4. La 19-an de junio glivicaj esperantistoj estis kunorganizantoj de la tradiciaj ĉiujaraj renkontiĝoj de esperantistoj el Pollando, Ĉeĥio kaj Slovakio sur la ĉeĥ-pola lim-monto Ĉantoria. Partoprenis pli ol 90 e-istoj el la tri landoj.

● Infana Esperanto-semajno (14-19. 06. 1994, Kemiö de Finnlando) tre plaĉis al 10 geknaboj el Helsinki, Rauma, Turku, Piikkiö kaj Kemiö. Iliaj aĝoj estas inter 8 kaj 16. Nur la du plej aĝaj konis iom da Esperanto, ĉiuj aliaj estis komencantoj. Per kanto, ludo, kolorigo kaj skribo, kiam ordinaraj lecionoj ŝajnis lacigaj, ili lernis elementan Esperanton. La 17-an de junio okazis ekzameno, ili ricevis notojn de la kontentaj ĝis la bonegaj. Kune gvidis la kurson Carola Antskog, Anna-Liisa Ali-Simola kaj Tuomo Grundström. La venonta kurso okazos la 19-25-an de februaro 1995.

● S-ino Hrisula Kujumĝidou de Greklando forpasis la 25-an de marto 1994. Ŝi naskiĝis en 1927 kaj esperantistiĝis en

1964. Ŝi estis fervora membro de la Tesalonika Esperanto-Ligo kaj kelkjara estraranino. Ŝi estis tre konata ĉe sufiĉe multaj E-societoj.

● De la 30-a de aprilo ĝis la 6-a de majo okazis en Bydgoszcz de Pollando la 10-a Internacia Simpozio de MONDA TURISMO kun partoprenantoj el 15 landoj de Eŭropo, Ameriko kaj Azio. Ĝia ĉefa temo estis “Rolo de kulturo en integriĝo de Eŭropo kaj de la mondo”. Kune kun la simpozio okazis la 19-aj Esperantaj Tagoj de Bydgoszcz, la 9-a Tutpollanda Junulara Konkurso pri Esperantaj Poezioj kaj Kanzono, kaj semajno de la hispanaj kulturo kaj lingvo. Paralele okazis en Bydgoszcz pola studsesio de la Akademio Internacia de la Sciencoj de San Marino (AIS). Solena komuna kunveno de la AIS-sesio kaj “MT”-simpozio okazis en la Instituto pri Historio de la Pedagogia Altlernejo en Bydgoszcz, invititaj estis urbaj aŭtoritatuloj, kaj la regionaj gazetaro kaj televido vaste informis pri ĝi. Rezulte de kunlaboro kun la Pedagogia Altlernejo kaj kun AIS, la estraro de “MONDA TURISMO” decidis transformi la Internacian Studumon pri Turismo en Bydgoszcz, kiu ĝis nun havis unujaran instruprogramon, en Internacian Studumon pri Turismo kaj Kulturo, kiu ebligos ankaŭ dujaran kaj eĉ trijaran studadon.

Finnlandaj geknaboj en la Infana Esperanto-semajno



Nekrologo



S-ro Xu Shanshu, eksa vicdirektoro de la redakcio de El Popola Ĉinio, forpasis pro malsano en Pekino la 7-an de aŭgusto 1994, en la aĝo de 72 jaroj.

Li estis multe respektata veterano. En la Dua Mondmilito li partoprenis la batalon kontraŭ la japanaj faŝistoj sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio kaj poste sin okupis pri sindikata laboro dum longa tempo.

Jam en sia juneco li eklernis Esperanton. Li amis nian lingvon kaj aktive subtenis Esp-movadon. Li estis ankaŭ konstanta komitatano de ĈEL, vicprezidanto de la Pekina Esperanto-Asocio kaj ĉefredaktoro de "La Mondo", organo de ĈEL.

Post emeritiĝo lin atakis kancero. Firmvole batalante kontraŭ la malsano, li finplenumis la kompiladon de la libroj "Bakin kaj Esperanto" kaj "Kolekto de Noveloj Elesperantigitaj de Wang Luyan".

La forpaso de s-ro Xu Shanshu estas perdo por la ĉina Esp-movado, precipe por El Popola Ĉinio. Li vivos por eterne en nia koro.

Kvina konkurso de EPĈ-legado

Jen venas la kvina konkurso de EPĈ-legado, kiun ni iniciatis en 1990. La konkurso vekis intereson de la legantoj, ke multaj el ili partoprenis en ĉiuj kvar konkursoj. Ni esperas, ke pli da niaj legantoj partoprenos en la konkurso kaj donos konsilojn.

Por la ĉi-foja konkurso estas 12 demandoj. Vi facile respondos ĉiujn demandojn, se vi tralegis ĉiujn artikolojn en 1-11 n-roj de EPĈ de 1994.

Ĉiuj partoprenantoj de la konkurso ricevos memoraĵon. La sola gajninto de la unua premio ricevos brokatan tablotukon kaj ĉiu el la dek gajnintoj de la dua premio ricevos ĉemizon de "El Popola Ĉinio".

Skribu la n-rojn de la demandoj kaj viajn respondojn sur papero kaj sendu ĝin al nia redaktoro s-ro Wang Hanping antaŭ la 15-a de januaro 1995.

I. Metu post la numero de ĉiu demando la signon V aŭ X.

1. Yangzi-rivero kun la totala longo de 6 300 km estas la 3-a granda rivero en la mondo. La baseno de la rivero kovras areon de 1.8 milionoj da kvadrataj kilometroj. Laŭ la rivero estas gravaj urboj, kiaj Ŝanhajo, Nankino, Wuhan kaj Chongqing.

2. Oktobre de 1993 ĉinaj sportistinoj partoprenis en la konkurso de maratono okazinta en Hispanio. Ili okupis la unuajn kvar lokojn kaj gajnis la virinan teaman ĉampionecon.

3. La kongresa temo de la 79-a UK estas "Kia popolo, tia kulturo" kaj tiu de la 50-a Kongreso de TEJO — "Azio en la mondo".

4. La 4-a Monda Virina Konferenco okazos en Parizo septembre de 1995, kun la ĉeftemo "Sanigo, Klerigo kaj Labordono". Ĉ. 15 000 diverslandaj reprezentantoj kaj personoj ĝin ĉeestos.

5. Ĉinaj zoologoj trovis tri brunajn kaj unu blankan grandajn pandojn ĉe la suda piedo de Qinling-montaro en Shaanxi(Ŝenŝji)-provinco. Fakuloj opinias ilin la plej belaj sovaĝaj bestoj en la mondo.

6. Bioinĝenierio estas nova scienca fako rapide disvolviĝanta. Ĝi estas destinita por studi pri kombino kaj malkombino de ĉeloj kaj histoj de mikroboj, plantoj kaj animaloj, kun la celo produkti deziratajn varojn.

II. Plenigu la blankojn per ĝustaj respondoj.

1. "Analekto de Konfuceo" estas verkita de la antikva ĉina edukisto kaj filozofo

2. En la lastaj jaroj la Centra Registaro de la Ĉina Popola Respubliko investis al la Tibeta Aŭtonoma Regiono ĉ. _____ miliardojn da juanoj por aro da gravaj konstruoj por rapidigi la konstruadon de Tibeto.

3. _____ estas la plej grandioza el la fervojoj konstruataj en Ĉinio, kiu bezonas plej grandan investon. La fervojo totale longas 2 538 km, inkl. tiun de la branĉaj kaj trunkaj linioj.

4. Yangzhou, situanta ĉe Yangzi-rivero, estas bela antikva kultura urbo. _____ (701-762), granda poeto de Tang-dinastio (618-907), prikantis la urbon per la versoj "Mia amik' forlasis Pavilonon Flava Gruo, por Yangzhou en monato tria, pompa florsezon".

5. En 1993 en Pekino konstruiĝis la Monda Parko, en kiu kolektiĝis 106 miniaturaj vidindaĵoj de landoj.

6. Aprile de 1994 en Ĉinio sinsekve fondiĝis la Ĉina Veĉi-a Esperanto-Asocio, la Ĉina _____ Esperanto-Asocio kaj la Ĉina Medicina E-Asocio.


ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO

La libro konigas al vi la ĉinajn historion, geografion, kulturon, pikturon, metiarton, literaturon, turismon, Esperanto-movadon k.a. Se vi volas havi sciojn pri Ĉinio aŭ fari turisman vojaĝon al ĝi, legu la libron, kiu certe interesos kaj helpos vin.

Formato: 14 cm. × 20.4 cm. 330 p. kun 16 koloraj kaj 56 nigra-blankaj bildoj.

Prezo: 8.00 USD

Mendu ĉe Distribua Fakoj de EPĈ, Libroservo de UEA aŭ peranto de EPĈ en via lando.



ĈINA CERAMIKO

Ĉinio estas hejmlando de porcelanaĵoj.

La ceramika produktado de Ĉinio komenciĝis en neolitiko. La libro detale konigas al vi la historion de la ĉina ceramiko.

Formato: 12 cm. × 18.4 cm. 260 p. kun 16 koloraj kaj 45 nigra-blankaj bildoj.

Prezo: 6.00 USD

Mendu ĉe Distribua Fakoj de EPĈ, Libroservo de UEA aŭ peranto de EPĈ en via lando.



Dekunu paroladetoj pri Pekoteko

de IVAN KO

DEKUNU PAROLADETOJ PRI PEKOTEKO konsistas el teksto-kajero (USD 4.00) kaj du kasedoj (USD 6.00), verkita de Rüdiger Eichholz, mendebila ĉe R. Eichholz, Esperanto Press, Bailieboro, Ontario, KOL 1BO Kanado, plus sendkosto USD 2.50.

Pekoteko estas akronima mallongigo por "Perkomputora Termino-Kolekto". Pro instigo prepari tiujn paroladetojn pri la Pekoteko-sistemo Rüdiger Eichholz en sia antaŭparolo unue dankas s-ron Pettyn de la Pola Radio, kiu pretis "amplekse popularigi" lian laboron kaj petis lin magnetofone registri taŭgajn tekstojn, kiujn Pettyn povus elsendi.

R. Eichholz klarigis, ke li provis verki la paroladetojn tiel, ke ili estas kompreneblaj ankaŭ por esperantistoj, kiuj nenion komprenas pri komputado kaj kiuj ankoraŭ ne okupiĝis pri terminaraj laboroj. Tamen por la plej multaj esperantistoj la temoj estas tiel malkutimaj, ke ili ne multe profitos de unufoja aŭdado en radio. Tial estus bone, se la samaj paroladetoj povus servi ankaŭ kiel diskutbazo dum kunvenoj de lokaj Esperanto-grupoj. Sekve li preparis magnetofonajn registraĵojn kun teksto-kajero, por ke kunveno-gvidantoj povu facile respondi demandojn de aŭdintoj. Krome, pere de presitaj tekstoj li povas doni ekzemplojn de konkretaj Pekoteko-registraĵoj, kiuj pli bone komprenigos la sistemon ol nura paroladeto pri Pekoteko.

La celo de R. Eichholz estas montri, kiel komputoroj faciligas interkomunikadon, kiujn metodojn ni kapablas apliki por pliriĉigi nian lingvon kaj kiuj problemoj ekzistas, kaj instigi al diskuto pri diversaj eblecoj por solvi ilin. Se ni observas la hodiaŭan mondon, ni vidas terurajn sekvojn de modernaj teknikaj rimedoj. Tamen, dependas de ni tio, kiel ni utiligas ilin. Por Esperanto la tekniko provizas tute novajn eblecojn por informi pri nia lingvo, por instrui ĝin kaj por instigi aliajn homojn lerni ĝin. Necesas, ke ni konatiĝu kun tiuj eblecoj, ke ni pripensu, kiel plej efike apliki ilin,

kaj ke ni fine ekagu.

Pekoteko ebligas efikan kunlaboron de la esperantistoj en la tuta mondo por kompili multlingvaj vortaregojn sur kompaktaĵoj. Oni povas eldoni tiujn diskojn, por ke neesperantistoj, kiuj interesiĝas pri vortaroj, kapablu akiri ilin malmultekoste, se ili aĉetos aparaton konekteblan al komputoro, ĉar pere de tiuj kompaktaĵoj oni povos facile konvinki ilin pri la utilo de Esperanto, ke ili povos igi ilin lerni ĝin, eĉ se ili neniam intencis fari tion.

Produkti tiel ampleksajn multlingvaj vortarojn libro-forme estus finance neeble. Sed la elektronika produktado de ampleksega verko sur unu kompakta disko ne kostus pli ol produktado de malgranda verko sur samspeca disko.

Laborante por la projekto de kompaktaĵoj oni estos devigata rapidege evoluigi Esperanton, ĉar oni devas provizi terminojn por ĉiuj nocioj registritaj en la multlingvaj vortaroj.

Espereble R. Eichholz, pere de tiu ĉi klopodo, faros valoran kontribuon ne nur al Pekoteko sed ankaŭ al la popularigo de Esperanto, kaj tion sendube subtenos multaj el la esperantistoj diverslandaj. ■

ABONTARIFO DE EPĈ POR 1995

Lando	Valuto	Abonprezo	Sendokosto	Totale
Aŭstralio	AUD	19,00	16,00	35,00
Aŭstrio	ATS	192,00	128,00	320,00
Belgio	BEF	575,00	375,00	950,00
Britio	GBP	10,00	6,00	16,00
Germanio	DEM	28,00	18,00	46,00
Finnlando	FIM	61,00	50,00	111,00
Francio	FRF	88,00	62,00	150,00
Israelo	USD	14,00	12,00	26,00
Italio	ITL	20200,00	13800,00	34000,00
Japanio	JPY	1900,00	1600,00	3500,00
Kanado	CAD	17,00	15,00	32,00
Nederlando	NLG	28,00	23,00	51,00
Nov-Zelando	NZD	26,00	22,00	48,00
Svisio	CHF	23,00	17,00	40,00
Usono	USD	14,00	12,00	26,00
TARIFO A	USD	14,00	12,00	26,00
TARIFO B	USD			15,00
TARIFO C	USD			10,00
TARIFO A: Ĉiuj landoj en Eŭropo escepte de tiuj menciitaj en la kategorio TARIFO C.				
TARIFO B: Korea Respubliko, Singapuro, Hongkong, Turkio, Meksikio kaj ĉiuj landoj en Latin-Ameriko.				
TARIFO C: Ĉiuj landoj de Orienta Eŭropo (inkluzive de Estonio, Latvio, Litovio, Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj kaj eks-Jugoslavio) kaj ĉiuj ceteraj landoj en Azio kaj Afriko ne menciitaj supre.				
Rim. Por aerpoŝta sendo bonvolu aldoni 10,00 usonajn dolarojn.				

La sentoplenaj homoj

LA homoj estas spirito de la universo. Tiel opinias la homoj mem, sed ne aliaj en la mondo.

En tre fora antikveco du ĉinaj filozofoj estis promenantaj. Unu el ili diris, montrante fiŝojn en lago: "Vidu, kiel ĝoje naĝas la fiŝoj." Kaj la alia diris kun fermittaj okuloj: "Vi ne estas fiŝo, kaj kiel vi povas scii la ĝojon de la fiŝoj?"

Naturo estas naturo, monto estas monto, akvo estas akvo kaj arbo estas arbo, sed nenio alia. Ili ekzistis kaj ekzistas antaŭ kaj post la naskiĝo de la homaro.

La homoj estas plej sentoplenaj.

La homoj diris, ke la tero estas patrino milda kaj indulgema.

La homoj diris, ke la suno estas patro brila kaj bruliĝema.

La homoj diris, ke la birdoj estas plej gajaj kaj kantas de mateno ĝis vespero.

La homoj diris, ke la floroj estas plej romantikaj kaj disvolviĝas en printempo por esprimi sian amon.

La homoj diris, ke la montoj estas plej superbaj kaj nesubigeblaj kaj la akvo estas milda kaj ŝanĝiĝema.

La homoj diris ankaŭ, ke pluvo estas splena kaj karesema.

La homoj diras, kion ili volas, ĉar la naturo estas neparolipova kaj sensenta. Ĝi ne komprenas, kion la homoj diras.



Iu estis iranta sur vojo en bona humoro. Li diris: "Kiel bona estas la vetero! Tiel blua estas la ĉielo, kiel la sentoplenaj okuloj de juna fraŭlino! La suno varmiĝas, la vento dolĉe karesas, la folioj de arboj intime interparolas, kaj ĉiuj pasantoj havas rideton sur la vizaĝo."

Sed sur la sama vojo estis alia homo, kiu perdis la patron. Ponto aŭ domo, kiun li projektis, disfalis, kaj knabino, kiu nomiĝis Amo, foriris de li. Kaj li diris: "Ho, diabla vetero! La ardanta suno kvazaŭ formikadas sur mia korpo, la vento mokas min kaj ŝutas polvon en miajn okulojn. La folioj babilaĉas, kiel klaĉemulinoj. Kial la pasantoj estas tiel ĝojaj kaj ridas, kiel pajacoj?" Pasante sur la vojo, li sentis sin en dezerto, tute solece.

Kiel sentis la aliaj pasantoj sur la sama vojo? Ĉiuj havis sian propran korstaton kaj senton.

Cent rigardantoj havas cent Hamletojn. Kiel trafa komentario! Ĉiu homo havas po unu naturon. Ofte okazas, ke la naturo vidata kaj perceptata de unu homo estas absolute malsama ol tiu de iu alia, kaj ĝis nun ni ankoraŭ ne trovis taŭgan mezurilon por mezuri tiun grandegan diferencon.

Eble ĝuste pro tio, la mondo povas esti tiel mirakla kaj multkolora, ke la homaro kreis la lingvojn por interŝanĝi opiniojn kaj paroli pri komprenaĵoj. Virinoj estas babilemaj, kaj verkistoj estas pli ol ili. ■

La tuta socio zorgu pri agrikulturo

de JIANG NONG

80 procentoj de la ĉinoj loĝas en la kamparo. Do, la disvolviĝo de agrikulturo kaj leviĝo de la vivnivelo de la kamparanoj fariĝis problemoj ekstreme grava por la tuta nacia ekonomio kaj stabileco de la socio. La progreso de la nacia ekonomio dependas ĉefe de la stato de tiuj 80 procentoj.

Tial la ĉinoj ĉiam akcentas la gravecon de agrikulturo. En la lastaj dekelke da jaroj multe ŝanĝiĝis la ĉina kamparo. Riĉa rikolto de greno estis gajnita en sinsekvaj jaroj, kaj la jara produktokvanto de greno superis 425 miliardojn da kg. Granda parto de la kamparanoj iom post iom liberigis sin de malriĉeco.

Tamen problemoj ankoraŭ ekzistas en la agrikulturo kaj la kampara ekonomio de Ĉinio. La unua problemoj estas relative rapida leviĝo de la merkata prezaro de agrikulturaj produktaĵoj. La prezaro en 1993 kreskis je 13.4 procentoj, kompare kun tiu en 1992. La dua problemoj estas malrapida kresko de la enspezo de la kamparanoj. De 1989 ĝis 1993 la jara meznombra kresko de la enspezo de la kamparanoj estis nur 1.88 procentoj, kaj refoje grandiĝis la distanco inter la enspezoj de la urbanoj kaj kamparanoj. La tria problemoj estas kreskanta senlaboreco en la kamparo. Kvankam la rapida disvolviĝo de la sekundara kaj terciara industrioj en la kamparo donis laboron al multaj superflujaj laborkapabluloj, tamen 120 milionoj da homoj ankoraŭ ne havas laboron. La migrado de grandnombraj kamparanoj ne nur ne bone influas la agri-

kulturan produktadon, sed ankaŭ kaŭzas multajn sociajn problemojn.

Koncernaj gvidantoj de agrikulturaj administracioj opiniis, ke tiuj problemoj estas supraĵaj fenomenoj, kaj pli gravaj kontraŭdiroj kaj problemoj estas kaŝitaj.

Unue, ne estas sufiĉa la ŝtata, kolektiva kaj individua investo por agrikulturo. En 1993 la ŝtato investis 10.5 miliardojn da juanoj por la fundamenta konstruado de agrikulturo. Post dekalkulo de negativa kresko pro prezaltiĝo, la investo por agrikulturo malkreskis de 2.8 en 1992 al 2 procentoj de la totala investo por la fundamenta konstruado. En 1993 la meznombra investo de ĉiu kamparana familio por produktado kreskis je 1.1 procentoj, kompare kun tiu en 1992, kaj la efektiva kresko malmultiĝis je 4.3 procentoj. En iuj lokoj ju pli disvolviĝis ekonomio, des malpli rapidiĝis la kresko de investo de la tieaj kamparanoj por agrikulturo.

Due, pli kaj pli akriĝas la kontraŭdiro inter la pufiĝanta loĝantaro kaj la rapida reduktiĝo de kampoj. Statistikoj raportis, ke en 1992 la ekspluataj distriktoj de la tuta lando okupis 1.46 milionojn da hektaroj da tero, kaj plie, kun pufiĝo de la loĝantaro, la meznombra kampo por ĉiu ĉino reduktiĝis de 2.7 *mu*-oj (15 *mu*-oj egalas al unu hektaro) en la komenca tempo de la 50-aj jaroj al 1.23 *mu*-oj en la nuna tempo. De post 1984 la kreskinta parto de greno estis forkonsumita de la kreskinta parto de la loĝantaro, eĉ malgrandiĝis la grenaporcio de ĉinoj.

Trie, estas postiĝinta la scienc-

teknika progreso, kaj malaltiĝas la procento de la scienc-teknika kontribuo. La statistiko, farita de la Agrikultura Ministerio en 1993, pri cent gubernioj raportis, ke la elspezo por la agrikultura scienco kaj tekniko reduktiĝis je 33 procentoj, kompare kun tiu en 1992, ke 16 procentoj de la guberni-nivelaj agrikulturaj institucioj kaj 18 procentoj de agrikulturaj stacioj estis malinstalitaj. Multaj agrikulturaj teknikistoj forlasis agrikulturon, ke la disvastigo de scienco kaj tekniko kaj la preventado de fiinsektoj kaj malsanoj de plantoj estis malzorgataj.

Kvare, la socia servosistemo de agrikulturo estas nekompleta. Post ekpraktikado de la familia respondeca sistemo de laŭkontrakta produktado la kamparanoj urĝe bezonas malmulte pagigan aŭ senpagan servon donitan de regiona kolektiva ekonomia organizo. Sed tiuflanke la stato ne estas kontentiga por la kamparanoj.

Kvine, estas nekompleta la makroregada sistemo de la ŝtato super agrikulturo, kaj nesufiĉa la reganta forto. En la procedo de turniĝo al la sistemo de merkata ekonomio, la antaŭaj rimedoj de la registaro jam ne konformas al la nuna situacio, tial la urĝa bezono estas serĉi makroregadan rimedon konforme al la disvolviĝo de la merkata ekonomio.

Kie estas la eliro?

Krom sufiĉa zorgado de la registaroj de diversaj niveloj pri agrikulturo kaj subtenado de la tuta socio al ĝi, oni devas doni al agrikulturo ankaŭ praktikan kaj solidan subtenon. Estas informo, ke en

Luna kalendaro ŝatata de ĉinaj kamparanoj

de HOU JUELIANG

PRAHOMOJ loĝis en grotoj, ne sciis kulturi la teron kaj vivis tre simplan vivon de ĉasado kaj fiŝado.

Antaŭ 4 000 jaroj la ĉinoj komencis kulturi teron. La kamparanoj laboris de la leviĝo ĝis la subiro de la suno. Post multmultaj sukcesoj kaj malsukcesoj ili konsciis, ke agrokulturo estas influata de vetero, oni devas semi en konvena sezono kaj tro frua aŭ tro malfrua semado magrigas rikolton. Se oni malfruigas semadon eĉ je mallonga tempo, la tero siaflanke punos ilin por tuta jaro. Antaŭ 2 500 jaroj ĉina granda pensulo Konfuceo jam rimarkis tion kaj avertis, ke oni "ne preterlasu ĝustan tempon en agrokulturado".

Kiel scii la "ĝustan tempon"? Tio bezonas bonan konadon pri la influo de vetero sur rikolto kaj resumadon de sperto pri la reguloj de alternado de la sezonoj.

La antikvaj astronomoj jam frue komencis observi astronomiajn fenomenojn por doni konsultigon pri agrokulturo. Tiam ne

estis astronomia teleskopo nek meteorologia sputniko, kaj oni havis nur la nudajn okulojn kaj simplajn aparatojn. Tamen ili trovis regulajn astronomiajn fenomenojn, ekzemple, la leviĝo kaj subiro de la suno, la fazoj de la luno, la alternado de la sezonoj. La akumulado de scioj naskis la lunan kalendaron utilan por agrokulturo.

La homoj difinis la tempon de unu rivoluo de la terglobo kiel unu tagon, la periodon de la fazoj de la luno, nome la tempon de unu rondiro de la luno ĉirkaŭ la terglobo, kiel unu monaton kaj unu periodon de la alternado de la sezonoj, nome unu rondiron de la terglobo ĉirkaŭ la suno, kiel unu jaron. Oni dividis unu jaron en 12 monatojn. La granda monato havas 30 tagojn, la malgranda 29 tagojn kaj la 12 monatoj faras unu jaron el 354 tagoj. Tiu tagnumero estas je 11.25 tagoj malpli granda, ol tiu de la sunjaro, nome la tempo de unu rondiro de la terglobo ĉirkaŭ la suno. Por identigi la tagnumbron de la lunjaro kun tiu de la sunjaro, oni aldonas

al ĉiu tria jaro plian monaton, nome ĝi havas 13 monatojn. Dank' al tiu metodo, la ĉina luna kalendaro estas tre preciza.

La ĉina luna kalendaro strikte ligiĝas kun la fazoj de la luno, kion la kamparanoj tre atentis. Laŭ la fazoj de la luno ili rimarkis, ke en la unuaj kelkaj noktoj de ĉiu monato la luno ne aperas, ĉar tiam ĝi troviĝas inter la suno kaj la terglobo. Ĉirkaŭ la mezo de la monato la luno estas la plej hela. En la unua duono de la monato la luno aperas pli frue kaj oni nomas ĝin kreskanta luno, dum en la dua duono de la monato la luno aperas malpli frue kaj oni nomas ĝin malkreskanta luno. La kamparanoj aranĝas siajn vesperajn agadojn en la tagordo laŭ la fazoj de la luno: kamplaboron, draŝadon, gastadon ktp.

La kamparanoj preferas la lunan kalendaron ĉefe pro tio, ke ĝi difinis 24 sunperiodojn en unu jaro laŭ la ŝanĝiĝo de vetero. Tiuj sunperiodoj indikas temperaturon kaj pluvokvanton. La tempo inter du sinsekvaj sunperiodoj estas duonmonato. Ekzempl-

la venontaj 5 sinsekvaj jaroj Ĉinio donos ĉiujare favoran krediton de 6.5 miliardoj da juanoj por subteni 523 grandajn guberniojn de varĝeno kaj 150 guberniojn de bonkvalita kotono. Tiuj gubernioj ĝuos 2 procentojn da kredita interezo, kaj la jara interezo de la kredito estos 8 procentoj. La ŝtato distri-

buos la kreditan sumon laŭ la produktokvanto de greno kaj kotono de tiuj gubernioj kaj ankaŭ laŭ la kvantoj de greno kaj kotono venditaj de la gubernioj al la ŝtato, por garantii la stabilan kreskon de la produktokvanto de greno kaj kotono.

Cetere, estas alprenitaj necesaj rimedoj protekti agrojn, entrepreni la prilaboran kaj furaĝan industriojn kun greno, oledona planto kaj kotona kromproduktaĵo kiel krudmaterialoj, kaj liberigi prezon de greno kaj aliaj agrikulturaj produktaĵoj. ■



ple, la luna kalendaro de 1994 difinis, ke la 10-a tago de la tria monato (la 20-a de aprilo laŭ la suna kalendaro) estas la Greno-Pluvo, kiu signifas, ke ekde tiu tago pli ofte pluvos kaj baldaŭ estos la tempo por semi grenon. Duonmonaton post la Greno-Pluvo, nome la 26-a de la tria monato (la sesa de majo laŭ la suna kalendaro) estas la Somerkomenco, kiu signifas, ke ekde tiu tago fariĝos pli kaj pli varme. Ĉu en la nordo, ĉu en la sudo de Ĉinio, la kamparanoj firme tenas la 24 sunperiodojn en sia memoro. Ili bone scias, kiujn sunperiodojn havas ĉiu sezono. Sed la datoj de sunperiodoj ne estas fikse difinitaj. Por scii ilin oni bezonas konsulti almanakon. Laŭ la sunperiodoj la kamparanoj povas scii la temperaturon. Ekzemple, la sunperiodo Printempokomenco signifas, ke baldaŭ forpasos vintro kaj venos printempo. La sunperiodo Insekto-vekigo signifas, ke degelas la glaciiginta tero, altiĝas la temperaturo de la tero, serpentoj, formikoj kaj aliaj insektoj vekigās el vintrodormado. La sunperiodo Varmego signifas la plej varmajn tagojn de somero. Kaj la Malvarmego signifas la plej malvarmajn tagojn de vintro.

Spartaj kamparanoj semas laŭ sezonoj. Ekzemple, en la tria tag-

deko de la tria monato laŭ la luna kalendaro (la unua tagdeko de majo laŭ la suna kalendaro) estas la sunperiodo Grajno-Pleniĝo, kiu signifas, ke oni devas semi sezamon kaj rikolti ajlojn. Se oni malfruigas semadon de sezamo, oni ne havos bonan rikolton. Se oni ne rikoltas ajlojn ĝustatempe, la ajloj putriĝos pro troa humideco de la tero. Oni povas diri, ke la ĉina luna kalendaro, formiĝinta sur la bazo de praktikado dum miloj da jaroj, estas instruisto de la kamparanoj.

La sunperiodoj ne nur indikas la ŝanĝigon de temperaturo en la kvar sezonoj, sed ankaŭ spegulas la ŝanĝigon de la longeco de tago kaj nokto. La kamparanoj scias, ke en la dua monato laŭ la luna kalendaro estas la sunperiodo Printempa Ekvinokso, kaj tiutage la tago kaj nokto estas egale longaj. Post la Printempa Ekvinokso la tago fariĝas pli kaj pli longa, dum la nokto pli kaj pli mallonga. En la unua tagdeko de la kvina monato laŭ la luna kalendaro (la tria tagdeko de junio laŭ la suna kalendaro) estas la sunperiodo Somer-Solstico, kaj tiu tago estas la plej longa en la jaro. Post la Somer-Solstico la tago mallongiĝas, dum la nokto longiĝas. En la mezo de la 11-a monato laŭ la luna kalendaro (la tria tagdeko de

decembro laŭ la suna kalendaro) estas la sunperiodo Vintro-Solstico, kaj tiu tago estas la plej mallonga en la jaro. Post la Vintro-Solstico la tago longiĝas, dum la nokto mallongiĝas. La ŝanĝigo de la longeco de tago kaj nokto alternas kun leĝo. La kamparanoj konas tiun ĉi leĝon kaj aranĝas kamplaborojn laŭ ĝi. Ili scias, ke dum transiro de printempo al somero, la tago estas longa kaj la nokto mallonga, kun la vetero nek varma nek malvarma, tiu tempo estas la plej bona sezono por laborado, kaj oni devas fari pli multe. En vintro la tago estas mallonga kaj la nokto longa, kun la vetero malvarma. Tiu tempo ne taŭgas por laborado, do ili penas plene utiligi la mallongan tagon por fari gravajn aferojn.

Tial por la ĉinaj kamparanoj la luna kalendaro estas nemalhavebla. Iuj konsilis uzi ekskluzive la sunan kalendaron asertante, ke ne necesas praktiki samtempe du kalendarojn en unu lando. Sed fakte, tio estas absurda. Kamparanoj demandis: Ĉu la suna kalendaro havas la 24 sunperiodojn? Ĉu ĝi povas speguli la fazojn de la luno? La kamparanoj opinias, ke la suna kalendaro ne povas anstataŭi la lunan kalendaron, kiu havas sian apartan valoron por ekzisti.

La luna kalendaro estas tradicia kalendaro de Ĉinio, kiu formiĝis antaŭ 4 000 jaroj. Ĉiuj dinastioj zorgis pri la revizio de la kalendaro. Post senĉesa astronomia observado oni reviziis malnovan kalendaron kaj ellaboris novan. En la historio estis publikigitaj 66 kalendaroj, el kiuj 10 estis famaj. Por la naskiĝo de tiuj kalendaroj multaj astronomoj oferis sian tutan vivon. Ĉina astronomo Guo Shoujing en la 13-a jarcento konstatis post preciza kalkulo, ke unu tropika jaro havas 365.2425 tagojn, same kiel montris la Gregoria kalendaro. Sed la kalkulo de Guo estis farita pli frue, ol tiu de Okcidento je pli ol 300 jaroj. ■



Interkonatiĝo



Kunsido pri la azia E-movado



Koreaj artistinoj en prezentado



ongresanoj en ekskurso



Ĉinaj esperantistoj en la inaŭguro



Ĉe EPC-giĉeto

Pri la Projekto de la Tri Gorgoj

Teksto de JI PING

Fotoj de HU YIYIN

DE Yueyang mi veturis supren kontraŭ la fluo de la rivero kaj atingis Yichang de Hubei-provinco. Okcidente de la urbo, anstataŭ senlima ebenaĵo, prezentigas antaŭ miaj okuloj profunda ravino kun apikaj krutaĵoj ambaŭflanke, kie torentas la rivero. Post nelonge komenciĝos la pivota akvoutiliga konstruado de la Tri Gorgoj de Yangzi-rivero (aŭ alinome projekto de Tri Gorgoj) en Sandouping de Yichang.

LA GRANDA AKVOBARAĴO KONSTRUATA

La Projekto de la Tri Gorgoj estas konata kiel la plej granda akvoenergia konstruo en la ĉina historio. Ĝi havos digon 185 m altan

kaj generatoran kapaciton de 18.2 milionoj da kilovattoj. Por la konstruado, kiu daŭros 17 jarojn, oni bezonos pli ol 100 miliardojn da juanoj kaj transloĝigon de miliono da loĝantoj. Ĉio ĉi estas atentata de alilanda publiko.

Mi intervjuis s-ron Guo Shuyan, vicestron de la Konstrua Komisiono de la Projekto de la Tri Gorgoj. Li diris, ke la granda konstruo estos uzata por preventi inundon, doni elektron, liveri akvon kaj faciligi navigadon. Laŭ la plano, la unua periodo de la konstruado daŭros de 1993 ĝis 1997. En tiu periodo oni faras aŭ faros preparan laboron por ĝi kaj la unuaperiodan konstruadon de la akvobaraĵo. Nun jam komenciĝis la konstruado por instali ekipaĵojn por doni elektron, liveri akvon,


funkciigi trafikon kaj ebenigi la lokon, kie estos la akvobaraĵo. De 1997 ĝis 2003 oni faros la duaperiodan konstruadon de la akvobaraĵo, t.e., haltigon de la fluo de la rivero. En 2003 la unua generatoro ekproduktos elektron. Kaj en la jaroj 2003-2009 estos finkonstruita la granda akvobaraĵo.


Koncerne la kapitalon por la Projekto de la Tri Gorgoj, s-ro Guo diris, ke nun la plej urĝa problemo estas kolekto de la kapitalo bezonata en la kvin jaroj antaŭ haltigo de la fluo de la rivero. La ĉina registaro faris inviton al usonaj, kanadaj, japanaj, germanaj kaj rusaj entreprenantoj de generatoroj de mondfamaj grandaj hidroelektrejoj por interkonsiliĝi pri kuna projektado kaj farado de la konstruaj ekipaĵoj kaj tiuj de elektroproduktado kaj elektrotansmisio kaj ankaŭ pri la ebleco de kunlaboro. Rilate la kapitalon, la ĉina registaro faros traktadon kun koncernaj financaj establoj pri ebleco de internacia investado kaj ankaŭ pri maniero de investado.

ĈU MALAPEROS LA VIDINDEJOJ KADRE DE LA REGIONO DE LA TRI GORĜOJ?

La Tri Gorgoj estas fama pitoreskejo de Ĉinio pro siaj imponecaj kaj beleco. La akvonivelo de la Tri Gorgoj ege plialtiĝos, post kiam finkonstruiĝos la projekto. Ĉu tio

SKEMA MAPO DE LOKOJ ĈE YANGZI-RIVERO





Zhongbaodao-insuleto, sur kiu oni starigos akvobaraĵon

damaĝos la pitoreskejon? Kiom da vidindejoj ankoraŭ postvivos?

En Yichang mi informiĝis de respondeculo de fako de historiaj restaĵoj, ke post finkonstruiĝo de la granda akvobaraĵo la akvonivelo de Sandouping plialtiĝos de 66 m al 175 m super la marnivelo. Tiel pli ol 400 historiaj vidindaĵoj estos superakvigataj, inkl. de multaj ruinoj de la antikva kulturo.

Nun ĉinaj fakoj de historiaj restaĵoj alprenis diversajn rimedojn por protekti la historiajn restaĵojn en la loko, kie estos la granda akvobaraĵo. Iuj antikvaj konstruaĵoj kun kompare kompleta strukturo, kiaj temploj, pagodoj, kioskoj, pontoj kaj loĝdomoj, estos translokita en la tuto laŭeble. Granda kvanto da valoraj ŝtongravuraĵoj kaj engrotaj statuoj estos translokita kun iliaj sokloj. Por ordinaraj historiaj restaĵoj oni konservos iliajn materialojn en arkivo. La pejzaĝo de la Tri Gorgoj eble perdos pli-malpli da imponeco, tamen ĝi ne estos detruiita, sed eĉ iom pli ĉarma ol nun. La montpinto Diino kaj aliaj 11 montpintoj estas 800-1 500 m super la marnivelo. Post kiam finkonstruiĝos la granda akvobaraĵo, la akvonivelo eĉ la piedo de la montpinto Diino plialtiĝos je nur 50 m. Oni firmigos la bazon de la antikva konstruaĵo Shibaozhai kaj pli misterumos la 12-etaĝan turon Lanruodian.

La Tri Gorgoj havas multajn

branĉetojn kun krutaĵoj kaj ondantaj montoj ambaŭflanke. Malhelpate de montoj kaj riveroj, ili neniam estis vizitataj. Post kiam la akvonivelo plialtiĝos, multaj vidindejoj, belaj kiel la Tri Gorgoj, estos malfermitaj kaj formos novan turisman reton. Foje ni havis la feliĉon boate veturi por rigardi la Malgrandajn Tri Gorgojn de Wuxia-gorgo. Nia ĉiĉeronino diris, ke post la finkonstruiĝo de la akvokonservejo trans la Malgrandaj Tri Gorgoj aperos pli originalaj Miniaturoj Tri Gorgoj. Kaj krome, oni povos ŝipe atingi la praarbaron en Shennongjia (Ŝennongĝja) de Hubei-provinco, kie laŭdire vivas sovaĝaj homoj, la pitoreskejon Gaolan kaj nove malkovritajn grotojn kaj ŝtonarbarojn de la gubernio Badong.

TRANSLOĜIGO DE MILIONO DA HOMOJ

Por fini la konstruadon necesas transloĝigi milionon da lokanoj. Kie ili enloĝiĝos? Ĉu ili volus forlasi sian hejmlokon?

Laŭ statistiko la urbanoj konsistigos pli ol duonon de la transloĝigotoj. Ili laboros en novaj urboj kaj ne bezonos denovan labordonon. La kamparanoj konsistigos 45.8% de la transloĝigotoj. Nun ili disloĝas en 326 ŝjangoj (subdistrikta administra unuo en Ĉinio) de 19 gubernioj kaj urboj de la provincoj Hubei kaj Sichuan. Nek la transloĝigotoj nek la subakvigotaj kampoj

atingos 3% de la loĝantoj kaj kampoj de la 19 gubernioj. Multaj transloĝigotoj laboros proksime de sia vilaĝo aŭ ŝjango. Nur triono de la transloĝigotoj enloĝiĝos en lokoj kompare fore de sia hejmloko.

Antaŭe oni kompensis la perdon de tiaj transloĝigotoj per unu fojo. Tio garantiis la vivon de la transloĝigotoj, tamen estis malfacile en mallonga tempo disvolvi produktadon en la nova regiono. Nun oni planas alpreni novan politikon: Utiligi la investaĵojn de transloĝigotoj kaj ekspluati riĉfontojn ĉelokajn kun la celo meti solidan bazon por la vivo kaj produktado. La loka registaro helpas ĉiujn transloĝigotojn de la kamparo ekspluati po unu *mu-on* (unu *mu-on* egalas al 1/15 hektaro) da kampo por kulturi oranĝarbojn, tearbojn, morusarbojn kaj drogherbojn kaj po duonan *mu-on* da produktiva kampo, por ke ili tenu sian antaŭan vivnivelon kaj plie sin riĉigu.

En la vilaĝo Lijiapo de Zigui-gubernio kreskas 60 hektaroj da oranĝarboj plenaj de fruktoj. Antaŭe tie estis dezertaj montoj. En 1985 la loko estis ekspluatita kiel regiono por transloĝigotoj. La vilaĝestro diris: "La kampoj kaj oranĝarboj estas kulturataj de vilaĝanoj laŭ kontrakto. En la unuaj jaroj la ŝtato ne kolektis de ili pagon kaj nur de la oka jaro ili komencis doni al la ŝtato oranĝojn kiel lupagon." La politiko estas tre favora al la kamparanoj.

La maljuna kamparano Yang Mingfang en Fuling de Sichuan-provinco diris al mi, ke antaŭ ol la registaro asignis monon al transloĝigotoj, li prunteprenis 8 000 juanojn kaj konstruis du-etaĝan domon sur la malantaŭa deklivo 100 m for de la malnova domo. Ĉirkaŭ la nova domo estas fruktoĝardeno kun areo de 2/3 hektaro, asignita de la registaro al li. Sole el tio li enspezis 2 000 juanojn en 1993. Li ofte diras: "Prefere frue transloĝiĝi ol malfrue tion fari."

Granda nombro da kamparaj transloĝigotoj okupiĝas pri terkul-



En Yichang-regiono


Konstruejo de la Projekto de la Tri Gorĝoj

Foto de ZHAI YUYU

turado kaj iuj junuloj laboras en fabrikoj aŭ servas en trafikaj, komercaj kaj terciaraj industrioj, kio akcelas la disvolviĝon de la loka ekonomio. La Kosmetikaja Fabriko de Wanxian, Sichuan-provinco, estis fabriko preskaŭ bankrotiĝinta. Post 1985 ili dufoje faris teknikan reformadon per 840 000 junaĵoj por transloĝigitoj kaj donis laboron al 85 transloĝigitoj. Kaj en 1990 la profito plene kovris la investaĵon.

En la konstruado ok urbetoj estos subakvigitaj kaj kvar urboj parte subakvigitaj. Nun la novaj urbetoj estas en streĉa konstruado.


La gubernia urbo de Wushan, kie estas la montpinto Diino kaj la Miniaturaj Tri Gorĝoj, estos subakvigita. Laŭ ŝtuparo mi iris supren al la antikva mont-urbo kaj vidis, ke en ĝi sterniĝas mallarĝaj stratoj, staras malnovaj domoj, moviĝas homfluo kaj estas nekom-



pletigitaj publikaj instalaĵoj.

Nun oni jam komencis la konstruadon de la novaj urbaj kvartaloj sur la dezerta montaro supre de la malnova urbo. La novaj urbaj kvartaloj estas projektitaj de la Ĉina Akademio de Urba Projekta-

do. Ambaŭflanke de la du ĉefaj stratoj estas nun arbarizataj. La novaj altaj domoj kontrastas kun malnovaj konstruaĵoj en la malnova urbo. Ne estas senkaŭze, ke iu juna homo diris: "Ni preferas transloĝiĝon, ĉar post tio ni havos novajn domojn." ■



La Memorhalo de Qu Yuan en Zigui

Yichang



En folkloraj amuzejoj de Pekino

LA malnova Tianqiao (Tjanĉjaŭ) de Pekino estis amuzejo tre ŝatata de loĝantoj. Tie oni povis gustumi diversajn etmanĝaĵojn kaj ĝui kant-rakonton, teatraĵon, boksen ludon, varieteon k.a. La tetrinkejo Tianqiaole, kiu ekfunkciis lastatempe, kvankam ne prosperanta kiel la malnova Tianqiao, multe konigas la folkloron de la malnova Pekino.

Ĉe la enirejo akceptanto, kiel malnova pekina teservisto, portas robon, kun vertoĉapo sur la kapo kaj lavtuko sur la ŝultro. Li kun rideto kaj longe tirata voĉo en tipa pekina akcento krietas:

“He! Bonvolu eniri...”

En la tetrinkejo vendiĝas etmanĝaĵoj ambaŭflanke de la trairejo, kie regas kriado kun ritmo. Kompreneble, la plej allogaj estas 10 specoj de fama teo kaj diversaj etmanĝaĵoj kun aparta gusto, kiaj sojfabo lakto, pizkuko, fritita farĉita kuko, kuirita ŝafinternaĵo kaj platpano kun rostita bovaĵo. Al-tiras la atenton ankaŭ sitelo por sojfabo lakto, vinvazo, ĉarumo por farunaĵo el glueca rizo, kupra kruĉo ktp.

Gustumante etmanĝaĵojn kaj trinkante teon, oni povas apreci la teatron projektitan laŭ la strukturo de pekina tetrinkejo ekzistanta en la komenco de la 20-a jc. Ĝi ne estas fremda al maljunaj pekianoj. Jen komenciĝas prezentado de teatraĵo, varieteo, kant-rakonto, humur-dialogo k.a., kiuj de longe malaperis en Tianqiao. Intertempe, flor-vendistinoj en belaj vestoj kaj etvendistoj de sukertegi-



La tetrinkejo Tianqiaole

taj kratagfruktoj iras tien kaj reen inter spektantoj.

“Tion mi preferas en Ĉinio, ĉar el tio videblas la vera ĉina kulturo,” diris kultura konsilanto de la Aŭstralia Ambasadorejo en Ĉinio. Jen kial diversaj aŭtoj staras antaŭ la pordo de tiu tetrinkejo.

Krom ĝi, en Pekino estas ankaŭ aliaj folkloraj amuzejoj.

Maje de 1993, kiam s-ro Shimon Peres, ministro de eksteraj aferoj de Izraelio, unuafoje venis al Ĉinio, li deziris viziti la Tetrinkejon de Lao She, amuzejon kun intensa pekina koloro. Lao She estis verkisto fama pro siaj romanoj kaj dramoj pri Pekino. La Tetrinkejo de Lao She estas aranĝita laŭ tiu priskribita en lia verko kaj nomata per lia nomo. La tago, en kiu

s-ro Shimon Peres vizitis la tetrinkejon, koincidis kun la tradicia izraela Festotago de Suferantoj. Laŭ la tradicia moro, tiutage al ĉiuj izraeloj estas malpermesate preni veturilon. Tial s-ro Peres kuretis de sia hotelo al la tetrinkejo, trapasante stratojn kaj tunelojn. Finfine li anhelante atingis la tetrinkejon antaŭ la komenco de la prezentado.

En la tetrinkejo aromas teo, belas floroj en vazoj, naĝas orfiŝoj en akvarioj, pendas pentraĵoj kaj kaligrafiaĵoj sur muroj, ĉarmas oranĝaj tasoĵ kaj kupraj kruĉoj sur tabloj, delikatpaŝe iras kaj reiras servistinoj en ruĝa robo...

La tetrinkejo Tianqiaole kaj la Tetrinkejo de Lao She ambaŭ famiĝas pro siaj teo kaj densa pekina

koloro. En la vivoplena tetrinkejo Tianqiaole revidiĝas moroj kaj foi-roj de la malnova Tianqiao, sed en la Tetrinkejo de Lao She regas eleganteco kaj kvieteco.

Kiam venis al la Tetrinkejo de Lao She Henry Kissinger, usona eksa ŝtata sekretario, aktoroj prezentis por li la pekinan operon *Riĉiga Dio*. Kiam la ĉefrolulo prezentis al li florkorbon ornamitan per

Poste ili prezentis operon en cent-pocenta pekina gusto.

En la amuzejo de folkloro kulturo de Pekino oni povas ĝui ankaŭ la palacan kulturon, kiun ĝuis antaŭe nur imperiestroj. En Kailai-hotelo oni gustumas ne et-mangaĵojn, sed palacajn mangaĵojn, spektas ne popolajn programerojn, sed palacajn kantojn kaj dancojn elegantajn, luksajn kaj

aktoroj.

Pekina opero estas kvintesenca de la ĉina kulturo. En Ĉinio estas ne nur multaj fakaj pekinoperaj trupoj, sed ankaŭ aroj da amato-roj, kiuj ofte kantas fragmentojn de pekina opero en parkoj kaj sur stratoj. Tio faras profundan impreson sur pasantojn. En ĉiu vespero aro da alilandanoj amantaj teatraĵon venas al Liyuan-teatro de Pekino. Pekinan operon eble ili ne tute komprenas, sed kun granda intereso ili spektas ĝin. Ŝajnas, ke ili ne nur rigardas la spektaklon, sed ankaŭ spertas persone la guston.

Tamen, la pekina opero pri luk-tado estas plej ŝatata de alilandanoj. Liyuan-teatro invitis elstarajn aktorojn de la Pekina Teatro prezenti proksimume 20 luktajn teatraĵojn, kiuj multe plaĉis al alilandanoj. La nombro de spektantoj kreskis de 67% pasintjare al 100% ĉi-jare. Alilandanoj, kiuj ne scias paroli ĉinlingve, povas diri en la ĉina lingvo: "Iru al Liyuan kaj ĝuu pekinan operon!"

Vizitante historiajn vidindejojn, tetrinkejojn kaj teatrojn de Pekino, iu alilanda studento venis al Xinjiang(Ŝinĝjang)-vilaĝo en la okcidenta parto de Pekino. Tie li ĝuis frandaĵojn kaj larĝigis sian vidkampon. Kvankam la loko ne estas folkloro amuzejo, tamen tie troviĝas absolute vera folkloro spektaklo. La vilaĝo estas malgranda loĝkvartalo de ujuraj komercistoj el Xinjiang de nordokcidenta Ĉinio. Ambaŭflanke de la strato staras butikoj unuj apud aliaj. En grandaj potoj stufiĝas ŝafaĵoj de mateno ĝis vespero, sur tabloj stakiĝas platkukoj, bonodoras rostitaj ŝaffemuraĵoj... Sur diversaj ŝildoj estas skribitaj vortoj en la ujugura lingvo, nelegeblaj por pekinanoj. Ekscitite de tiu aparta kultura atmosfero, tiu studento ne dormis la tutan nokton. Fakte, proksime de Xinjiang-vilaĝo estas la Nacia Kant-danca Frandaĵ-restoracio funkciigata de fama mongola kantistino Dedema. Li certe vizitus la restoracion, se li ĝin scius. ■



Alilandaj turistoj en la tetrinkejo

ruĝa rubando kaj plenan de ĉinaj oraj ingotoj, la malgranda orkestro ludis por li la usonan kampan muzikon *Meleagro en Pajlomaso*. Tre ĝoja, li komencis bati takton.

La Tetrinkejo de Lao She, tre ŝatata de maljunaj pekinanoj, funkcias kiel fenestro por alilandaj turistoj koni Pekinon. Ĝi estas nepre vizitata de elmigrintaj ĉinoj, kiuj venas al Pekino por serĉi siajn parencojn, ĉar por ili ĝi ne plu estas ordinara tetrinkejo, sed en ĝi ili sentas sin kiel hejme. Kiam s-ro Zhang Xiaoci (Ĝang Ŝjaŭci), direktoro de Dongwu-universitato de Taiwan, vizitis la tetrinkejon, antaŭ ĉio oni prezentis por li la Taiwan-an popolkanton *Por vendi gluecajn pastetojn*, kiu esprimis fratecan sentimenton, kaj ĝuis kun li la belecon de Taiwan-aj moroj.

pompajn. Iuj eĉ havas la okazon "imperiestriĝi".

En klasika muziko komenciĝis la vespera festeno. Laŭ malsamaj vivkutimoj de Eŭropo, Ameriko kaj Sudorienta Azio, la gastiganto zorgeme aranĝis la palacan feston. Sed kiel ajn malsamaj estas pladoj, rostita pekina anaso estas nemankigebla.

La vespera festeno estis akompanata de palacaj kantoj kaj dancoj de la periodo antaŭ Qin-dinastio (22 jc. — 221 a.K.) ĝis Ming- kaj Qing-dinastioj (1368-1911). Kiam oni prezentis kantojn kaj dancojn de Qing-dinastio, la prezidanto elektis inter la gastoj "imperiestron" kaj "imperiestran edzinon". Surmetinte sur sin "imperiestran robon", ili sursceniĝis kaj dancis kune kun la

“La Traviata” en Ĉinio

Teksto kaj fotoj de HAN HONG

Alfredo petas la manon de Violetta.



Post sia premiero ludita de la Centra Opera Trupo de Ĉinio en 1956, la fama opero “La Traviata”, verkita de la itala komponisto Giuseppe Verdi en 1853, estis ludita 400 fojojn en grandaj kaj mezgrandaj urboj de Ĉinio kaj fariĝis la plej influa itala klasika opero en Ĉinio, kiu havis plej grandan nombron da spektantoj.

Antaŭ nelonge la Centra Opera Trupo de Ĉinio estis sin preparanta por denove ludi la operon kaj engaĝis eminentajn aktorojn. Ekzemple la rolon de Violetta ludas s-ino Sun Xiuwei (Sun Ŝiŭŭej), kiu kantis en la itala lingvo kaj gajnis la duan premion en la Voĉmuzika Konkurso de Verdi en Italio. Alia rolulino estas Yao Hong, kiu gajnis la unuan premion de la virina grupo en la Kvara Internacia Opera Konkurso en Marsejlo de Francio. La roluloj de Alfredo estas s-ro Du Jigang (Du Ĝjigang), gajninto de la dua premio de la vira grupo en la Kvara Internacia Opera Konkurso en Marsejlo, kaj s-ro Huang Yuefeng, gajninto de “Premio de Prezento”, la plej alta ŝtata premio.

La bela melodio kaj la kortuŝa intrigo de la opero kaj la eminenta ludo de la artistoj refoje ravis la operamantojn en Pekino.



Violetta kaj la gastoj en drinkkantado

Denova renkontiĝo de Alfredo kaj Violetta

Violetta en malsano



LA TRAJTOJ KAJ HISTORIA ROLO DE ĈINAJ IDEOGRAMOJ

En la historio de la homaro nur Ĉinio neniam ĉesis noti skrib-lingve. La kaŭzo kuŝas ĉefe en ĉinaj ideogramoj, ĉar unu el la fundamentaj trajtoj de la ĉinaj ideogramoj estas, ke ili helpas la unueciĝon de la ŝtato. Ĉinajn ideogramojn karakterizas simbola skribo. La prononco estas farita laŭ la formo de ideogramo. Ĝi ŝanĝiĝas en malsamaj dialektoj, tamen tio ne malhelpas legadon. Ĝuste pro tio eĉ nunaj ĉinaj infanoj scias legi "Analektoj" de Konfuceo, verkitan antaŭ 2 500 jaroj.

Kiel "kontenero" de skriba lingvo, ĉinaj ideogramoj povas komuniki informojn rapide kaj koncentre. Ĉina ideogramo havas formon, kiu prezentas ian simbolon. Ĝi havas unu silabon kaj kvar tonojn. Evidente, ĉinaj ideogramoj, kun formo, prononco kaj senco kiel unu tuto, helpas komuniki kaj krei novajn informojn.

La senco de ĉina ideogramo akireblas ĉe legado aŭ aŭdado. Leginte iun ĉinan ideogramon aŭ aŭdinte ĝian elparolon, oni povas tuj scii ĝian formon. Tio povas plene ekspluati la latentan forton de la sensaj organoj kaj la hemisferoj de la cerbo kaj akceli la kulturan interŝanĝon.

Krome, la ĉinaj ideogramoj havas tre grandan eblecon en vortfarado.

La aplikado de komputeroj pli atentigas pri la "kontenera" rolo de ĉinaj ideogramoj. Dank' al invento de softvaroj por malsamaj ĉinaj ideogramoj komputeroj traktas ĉinlingvajn informojn ne malpli rapide ol la fonetik-skribajn.

La ĉinaj ideogramoj sur ostoj, bronzaĵoj objektoj, ŝtonaj tamburoj, sigeliloj kaj paperoj estas ne nur komunikiloj de informoj, sed ankaŭ artaj kreaĵoj de la ĉina popolo.

3 000-JARA TIBETA SKRIB-LINGVO

Kompilante la libron "Tibeta Skriblingvo kaj Kaligrafio", fakuloj trovis, ke la tibeta skriblingvo datiĝas eble de pli ol

3 000 jaroj.

Laŭ tradicia vidpunkto la tibeta skriblingvo estis kreita de Tunmi Sangbuzha, unu el la sep eminentaj korteganoj de Tubo-regno, laŭ la antikva sanskrito.

Historiaj libroj, verkitaj de adeptoj de Ben-religio en Tibeto, diras, ke antaŭ 7 000-8 000 jaroj en Tibeto oni uzis la skriblingvon Mar. Tiam en Tibeto ankoraŭ ne fondiĝis Tubo-regno.

Fakuloj faris historian esploron pri la socio de Ali-regiono kaj hazarde malkovris kvanton da historiaj materialoj, kiuj plejparte estas antikvaj surrokaj bildoj. Ili opinias, ke la bildoj estas manifestiĝo de la tibeta kulturo ekzistanta antaŭ 3 000 jaroj, kiam furoris Ben-religio. Sur tiuj bildoj ili trovis signojn similajn al skriblingvo. Ili trovis ankaŭ Mar-lingvajn presaĵojn en serio kaj folio, el kiuj unu temas pri lingvo. La fakuloj konkludis, ke antaŭ almenaŭ 3 000 jaroj tibetanoj scipovis uzi skriblingvon.

Laŭ la fakuloj la skriblingvo Mar ne estis perfekta. Antaŭ 1 300 jaroj, kiam regis regnestro Sunzamkampo, budhismo estis enkondukita en Tibeton. Intensa batalo iris inter budhismo kaj Ben-religio. Kun la kreskanta malgrandiĝo de la forto de Ben-religio la lingvo Mar estis uzata pli kaj pli malmulte.

Sed pro religia antaŭjuĝo la postaj historiistoj plejparte opiniis, ke en Tibeto oni komencis uzi skriblingvon en la tempo, kiam regis Sunzamkampo. Fakte, la nuna tibeta skriblingvo estas perfektigita surbaze de la skriblingvo Mar kaj post asimilo de trajtoj de la antikva hinda skriblingvo kaj fariĝis universala en Tibeto. Iuj fakuloj diris, ke la antikva hinda skriblingvo kaj nepala skriblingvo, verŝajne, strikte rilatas kun la skriblingvo Mar.

Kompreneble, iuj tibetologoj opinias, ke la origino de la tibeta skriblingvo estas enigmo malfacile solvebla. Ĉu vere estas solvo de la enigmo? Eble estas ankoraŭ frue doni ĝustan respondon.

La unua pasejo de la Granda Muro

Teksto de PANG NAIYING

Fotoj de REN SHIYIN

LA Granda Muro komenciĝas de Shanhai-pasejo kaj finiĝas per Jiayu-pasejo. La totala longo de la muro estas 6 700 kilometroj. La muro havas dekojn da pasejoj kaj Shanhai-pasejo estas la plej impona.

En la dua duono de la 14-a jarcento Ĉinio estis atencata de nordaj nacioj, kaj imperiestro Zhu Yuanzhang (1328-1398), fondinto de Ming-dinastio, sendis generalon Xu Da (Ŝju Da) defendi la nordan limon. En 1382 oni konstruis la pasejon 15 kilometrojn nordoriente de Qinhuangdao (Ĉinhūangdaŭ) de Hebei-provinco.

Norde de la pasejo estas la kontinua Yanshan-montaro, kaj sude Bohai-mar, tial la pasejo ricevis la nomon Shanhai (en la ĉina lingvo shan signifas monton kaj hai — maron).

Sur la turo de la pasejo oni vidas senliman montĉenon, kaj proksime estas la monto Jiaoshan (Ĝjaŭŝan). Ĝi estas la unua monto transpita de la Granda Muro. De la pasejo Shanhai la Granda Muro trapasas ebenan teron kaj venas ĝis la monto. Tie ĝi abrupte leviĝas kaj grimpas sur la monton. Poste ĝi serpentumas foren...

Rigardante suden, oni havas panoraman vidon

Chenghai-turo, nomata "Draka Kapo"



de senlima maro punktita de velŝipoj. Proksime de la bordo estas "Draka Kapo". Ĝi estas parto de la Granda Muro en akvo, konstruita de Xu Da. Poste alia Ming-dinastia generalo Qi Jiguang (1528-1587) garnizonis tie kaj konstruis ŝtonan fuorton kun gvatturo, kun areo de 500 kvadrataj metroj. En la unuaj jaroj de la 20-a jarcento la fuorto estis detruita de milito, kaj la "Draka Kapo" estis rekonstruata ekde 1985.

Shanhai-pasejo ĝuas renomon danke la natur-dotitan pejzaĝon kaj la grandiozan kastelon de la pasejo.

La ramita muro de la kastelo estis tegita per brikoj. Ĝi altas 14 metrojn, dikas 7 metrojn kaj longas pli ol 4 kilometrojn. Por fortikigi la kastelon, oni aldonis oriente kaj okcidente de la pasejo po unu pordon kaj fosis kanalon ĉirkaŭ la kastelo. Ĉiu pordo de la kastelo havis antaŭ si levponton super la kanalo. Inter la kastelo kaj la Granda Muro estas du feraj kluzoj. Sude kaj norde de la kastelo estis po unu flanka fuorto, garnizonejoj, alarmaj signalturoj kaj aliaj konstruaĵoj.


La kastelo havas kvar ĉefajn pordojn, kaj la plej granda el ili estas la orienta. Sur la pordo staras du-etaĝa turo kun embrazuroj alta je 12 metroj. Sub la alero pendas giganta tabulo kun ideografiaĵoj "Unua Pasejo en la Mondo".

Sur la tabulo oni ne indikis la daton de la skribo nek la nomon de la skribinto. La ideogramoj ĉiu altas 1.6 metrojn.

Antaŭ la pasejo estas strato. De tempo al tempo aŭdiĝas krio de ofertantaj kolportistoj de maizospiko, fiŝaĵo, akvomelono, persiko k.a. La malnovaj brikaĵoj kaj la mallarĝaj rektaj stratetoj vekas intereson ĉe la pasantoj pri la malgranda antikva urbo. En varma vespero maljunuloj sin refreŝigas ĉe sia pordo, svingante ventumilon. Rigardante la plenan aŭ arkan lunon super la paseja kastelo, ili interparolas pri pasejo kaj futuro. Sed la junuloj ne interesiĝas pri tio, ĉar ili havas multon por fari en la turisma sezono. ■




Shanghai-pasejo en malproksimo



Shanghai-pasejo

La templo de la Dio de Maro





Parto de la Granda Muro sur la monto Jiaoshan

“Draka Kapo”



Lulilo de sportaj ĉampionoj



Huang Zhihong (la kvara de dekstre) vizitanta la lernejon, kie ŝi studis


Lou Yun (maldekstre) kaj lia trejnisto



LA Zhejiang(Ĝeĝjang)-a Sporta Lernejo situanta en la orienta parto de Ĉinio fieras pri tio, ke ĝi faris grandajn kontribuojn al sportoj ĉinaj kaj mondaj: ĝi sinsekve elkulturis por la ŝtata teamo 386 elstarajn sportistojn, el kiuj 11 gajnis 29 mondajn ĉampionecojn, 12 gajnis 23 aziajn ĉampionecojn kaj 44, 60-foje la tutlandajn.

De 1974, la lernejo akceptis arojn da sportistoj, kiuj poste fariĝis eminentaj, dank' al diligenta kulturado de la instruistoj. Lü Lin, monda ĉampiono de tablotenis, skribis en letero al la lernejo: "Neniam mi forgesos mian vivon en la lernejo. Mi kore dankas miajn trejnistojn kaj instruistojn. Dank' al iliaj amo, prizorgado kaj rigora trejnado, mi iris sur sportistan vojon, penadis por la monda ĉampioneco kaj gloro de la patrujo." Liaj vortoj montris la komunan amon kaj dankemon de la sportistoj al la lernejo.

Dank' al trejnisto Wang Yongqi, Huang Zhihong fariĝis monda ĉampionino. Oni diris al Wang, ke estas 11-jara knabino Huang Zhihong, forta, altstatura kaj sunbruna. Sur la lud-kampo de korbopilko ŝin timas eĉ knaboj. Trejnisto Wang trovis ŝin kaj antaŭvidis en ŝi esperplenan sportis-



Ekzercado

ton de globojetado. Tiamaniere ŝi estis akceptita en la sportan lernejon.

Huang Zhihong estis ludema kaj petolema. Foje en matena kurado trejnisto Wang kun miro rimarkis, ke Huang, kiu ne ŝatas kuradon, kuris multe pli rapide ol la aliaj. Pririgardinte, li fine malkovris ŝian sekreton: ĉe kurbiĝo, ŝi kuris ne laŭ la kurba linio, sed laŭ la tanganta. Pro tio, ŝi estis punita per duonhora kurado.

Foje ŝi halteris ne laŭ la postulo kaj kompreneble ŝi estis severe punita. La plendo elglitis el ŝia buŝo: "Trejnisto Wang, kial vi ĉiam ĉikanis min?" Wang Yongqi diris: "Sen diligenteco vi ne sukcesos. Tion vi komprenos poste."

En la lernejo oni sin ekzercas ne nur per ĉefa sporto, sed ankaŭ per aliaj laŭplane. Ekz., globojetado estas la ĉefa sporto de Huang Zhihong, sed ŝi devas ekzerci sin ankaŭ per saltado, lancojetado, kurado k.a. por levi sian korpan elastecon.

Dank' al sia lerneja sukceso, la 14-jara Huang Zhihong estis elektita de la Ŝtata Teamo en 1979. Poste ŝi fariĝis atletika stelo en Azio kaj en la mondo. En 1989 ŝi gajnis la ĉampionecon de globojetado en mondopokala konkurso, en 1991, tiun de Internacia Ĉampioneca Atletika Konkurso kaj en

1992 la arĝentan medalon de Olimpikoj.

La trejnistoj de la Zhejiang-a Sporta Lernejo havas akran vidaĵon por elekti sportajn talentulojn. Lou Yun estis knabo malmaltstatura kun dikaj membroj. Ja ĝuste en li trejnisto Tang Changyan vidis la temperamenton kaj karakteron de gimnastoj: supereco, lernemo, saĝeco, aplombeco ktp. Li diris al Lou: "Vi estas lernema kaj forta en svingsaltado. Se vi diligente trejnados vin, vi certe sukcesos." Trejnisto Tang elkulturis lian obstinecon kaj diligentecon kaj inokulis en li idealon krei elstarajn sukcesojn.

De tiam Lou Yun diligente lernis kaj energie sin ekzercis. Por trejni sin sur reko, li suferis de frotvundoj sur manoj. Por sin ekzerci per ĉevalado, li, en sabloveŝto peza je 5 kg, saltis 25 fojojn en 10 minutoj. Finfine li havigis al si superban lertecon en ĉevalado: stabilan surteriĝon kaj ravan movon en la aero. Ekde 1981, kiam li komencis partopreni internaciajn konkursojn, li gajnis 70 orajn medalojn entute. Atinginte la kulminon de la monda gimnastiko, Lou skribis sur *Renmin Ribao*, fama ĉina ĵurnalo: "Mi klare konsciis, ke miaj sukcesoj rezultis el la prizorgo kaj penado de trejnisto Tang."

Poste trejnisto Tang elkulturis mondajn ĉampionojn Shen Hongwei kaj Yu Jie.

Ankaŭ tablotenisisto Lü Lin iam trejnis sin en la lernejo. Li komencis ludi tablotenison en la 6-jara aĝo. Dum 20 jaroj, li akiris preskaŭ ĉiujn honorojn, kiujn avidas sportistoj. Li estas ĉampiono de Olimpikoj, monda tablotenisa ĉampioneca konkurso kaj tutlanda sportkunveno. Nun li preparas sin por la 43-a Monda Tablotenisa Ĉampioneca Konkurso.

Post 20-jara penado, la Zhejiang-a Sporta Lernejo konata kiel lulilo de mondaj ĉampionoj multe pliboniĝis en la fundamenta konstruado: nova domo, norma stadiono, 2-etaĝa gimnastejo, halo por korbopilko kaj flugpilko.

Krom Huang Zhihong kaj Lou Yun la Zhejiang-a Sporta Lernejo elkulturis ankaŭ aliajn elstarajn sportistojn, kia He Cihong, monda ĉampionino de virina naĝado. Ĝi elkulturis ankaŭ por la Zhejiang-provinca Teamo de Virina Gimnastiko ĉiujn sportistinojn por la 8-a Tutlanda Sportkunveno kaj por la Ŝtata Teamo de Gimnastiko Cang Lan kaj Sun Yan, kiuj partoprenos la Olimpikojn en 2000. Ili estas esperplenaj steloj de la ĉinaj sportoj. ■




Homoplena plaĝo

La nova marbordo

Teksto de CHEN YINGLI

Fotoj de YAN JIN



Akvoamuzejo

Nandaihe estas pitoreskejo kun riveroj kaj verdaĵoj. Tie la klimato komforta, marbordo larĝa, pejzaĝo rava. Tie vintro ne estas frosta kaj somero ne varmega. La loko posedas kvin gravajn elementojn de turisma marbordo: maro, plaĝo, freŝa aero, sufiĉa sunlumo kaj verdaĵo. En Nandaihe la plaĝo estas ebena, la sablo subtila kaj la akvo klara.

Nandaihe apartenas al Qin-

Gajaj feriantoj



turisma Nandaihe



Mondparko

huangdao (Ĉinhŭangdaŭ), malfermita havenurbo ĉe Bohaimaro. Sed antaŭe Nandaihe estis sovaĝejo. Dank' al la konstruado de 10 jaroj la loko fariĝis fama somerumejo. Tie inter verdaĵoj estas centoj da domoj de diversaj stiloj. La turistojn altiras ne nur banejoj, sed ankaŭ sanatorioj, amuzejoj kaj parko de miniaturaj mondfamaj konstruaĵoj.



Vilao ĉe maro

Somerumejo Nandaihe



Rakonto pri kuracistino

ANTAŬ nelonge la plej granda televidstacio de Ĉinio, la Centra Televido, elsendis televidan filmon en serioj kun titolo “Rakonto pri kuracistino”. La heroo de la filmo estas ordinara ginekologi-obstetrika kuracistino. En sia pli-ol-30-jara kuracista kariero, ŝi per siaj ordinaraĵoj kuracis pli ol 20 000 malsanulojn sen ajna akcidento. Ŝi per sia eksper-ta medicina arto forigis doloron de la pacientoj kaj per sia alta moraleco montris sanktecon de kuracistoj. Ŝi suferas de kanceraj kaj estis multfoje operaciita, tamen ŝi ankoraŭ persistas sur sia posteno kaj bruligas la vivon de aliaj per sia vivo-fajro.

La rakonto ne estas fikcia. Ĝia viva modelo estas Zhao Xuefang, kuracistino de la ginekologi-obstetrika fakto de la Popola Hospitalo de Changzhi, Shanxi-provinco.


Ŝi ripozas malmulte. Ŝi akceptas pacienton ĉiam kaj ĉie. Kelkfoje, kiam ŝi, laca, revenis de sia laboro kaj renkontis survoje malsanulon bezonantan kuracadon, ŝi do sin returnis al la hospitalo kaj denove komencis sian laboron. Iutempe, kiam ŝi enpaŝis en sian hejmon, ŝin atendis ne nur ŝiaj edzo kaj filino, sed ankaŭ paciento. Ŝi do petis sian filinon pugneti al ŝi la dorson kaj fari al ŝi masaĝon, post tio ŝi komencis fari diagnozon al la malsanulo.

Zhao Xuefang naskiĝis en izolita montvilaĝo, malriĉa kaj postĝinta, tie la kamparanoj ne havis monon por kuracado kaj ies malgrava malsano serioziĝis pro

nekuracado. Iujare, la patrino de Zhao Xuefang forpasis kaj ŝi revenis al la hejmvilaĝo por funebraj aferoj. Tie ŝi restis kelkajn tagojn kaj trovis, ke pli ol 80% de la virinoj suferas de virinaj malsanoj kaj iuj mortis de tio. Utiligante simplajn ekipaĵojn de la subdistrikta kuracejo, ŝi faris diagnozon al ĉ. 300 virinoj kaj operacion al 6 virinoj.

Antaŭ ol forlasi la montvilaĝon, ŝi vizitis la operaciitojn kaj renkontis ĝemantan malsanulinon, kiu enhospitaliĝis antaŭ nelonge kaj al kiu oni faris envejnan pogutigadon. Ŝi informiĝis de iu kuracisto, ke ŝin atakis kolecistito. Zhao Xuefang skuetadis ŝian abdomenon kaj diris, ke ŝi suferas de ekster-utera gravedeco. Ŝi proponis, ke oni tuj faru al ŝi refojan diagnozon kaj operacion. Sed tiam ne estis elektro, ŝi do uzis du poŝ-lampojn por prilumo. Pro manko de transfuzata sango, ŝi do filtris sangon en la abdomeno de la malsanulino kaj retransfuzis ĝin al ŝi. La operacio sukcesis. Fininte la operacion, ŝi estis tuta en ŝvito. Oni konsilis al ŝi ripozi, sed ŝi diris: “Mi restu tie kaj observu la malsanulinon.” En la sekvanta mateno, kiam la operaciita kamparanino rekonsciĝis, ŝi ekploris, vidinte Zhao Xuefang ĉe sia lito.

Por rekompenci Zhao Xuefang, la kuracejo donacis al ŝi 500 juanojn. Ŝi, ricevinte la monon, donis 200 juanojn al la kuracistoj, kiuj partoprenis en la operaciado, 100 juanojn al la kuracejo por aĉeti simplajn ekipaĵojn kaj po 30 juanojn al 7 operaciitaj kaj operaciitaj malsanulinoj en la hospitalo. Ŝi diris al ili: “Frat-



Zhao Xuefang en operaciado

noj, aĉetu lakton per tiu ĉi malgranda monsumo!”

Kiel kuracistino, Zhao Xuefang neniam forgesis sian sanktan mision. Ŝi faris ĉion eblan por savi malsanulojn, se nur restis eta espero. Foje iun akuŝintinon atakis hemoragio pro cezara operacio. Kiam ŝi estis sendita en la hospitalon, ŝi preskaŭ ĉesis spiri kaj ŝia sangopremo montriĝis nula. Zhao Xuefang aplombe gvidis la kuracistojn kaj flegistinojn por fari al ŝi savadon kaj observadon, kaj poste ŝi esceptokaze faris al ŝi utero-entranĉan operacion. Post peniga laboro en 6 horoj, ili finfine savis la junan vivon kaj bone konservis ŝian uteron.

Ŝi estas nur unu el la malsanuloj, kiujn Zhao Xuefang savis.

Zhao Xuefang ne nur pene laboras kaj ĉiam strebadas al pli alta nivelo, sed ankaŭ trejniĝis multajn altnivelajn kuracistojn. La ginekologi-obstetrika fakto de la Popola Hospitalo de Changzhi, kie ŝi laboras, faras urĝan savadon meznombro al ĉ. 400 grave malsanaj pacientoj ĉiujare kaj la sukcesa procentaĵo atingis 100%.

Por helpi al la akuŝistinoj de la fakto lertigi la fingrojn por posedi ĝustan teknikon en akuŝigo, Zhao Xuefang kreis akuŝ-modelilojn, por ke ili ripete faru ekzercadon en kombinado de anatomiado. Sub rigora instruisto certe aperas eminenta lernanto. Akuŝistino Lu Xiufang iam lernis en granda hospitalo de Pekino por kompletigi siajn sciojn. En la unua tago

Masaĝo en la ĉiutaga vivo (II)

MASAĜO SUR LA KAPO

Sidu antaŭ la masaĝato, kiu kuŝas surdorse.

1. Metu viajn dikfingrojn ĉe la nazradiko de la masaĝato kun la ceteraj fingroj ambaŭflanke de la kapo. Malstreĉu viajn pojn. Puŝu la radiusan flankon de viaj dikfingroj de la nazradiko al la fruntomezo alterne 5-10 fojojn. Premu la akupunkturajn punktojn *jintang* per la pintoj de la dikfingroj (Bildo 1), kaj post tio per la pintoj premu la akupunkturajn punktojn *zanĝu*, *jujaŭ* kaj tempio kaj knedu la tempiojn per la palpa flanko de la dikfingroj. Ripetu tion 3 fojojn.

2. Per la mezaj aŭ montraj fingroj de viaj manoj knedu la akupunkturajn punktojn *ĝingming*, *ĉengĉji*, *sibaj* kaj *jingŝjang*. Poste, per viaj dikfingroj premfrotu la orbitojn suprajn kaj malsuprajn 3-5 fojojn.

3. Per la dikfingroj frotu la fronton malsupren de supre de ĝia mezlinio kaj frotu eksteren de la tempioj ĝis la aŭrikloj 3-5 fojojn. Atentu, ke kiam vi fro-

tas la aŭriklojn per la dikfingroj, vi devas meti la ceterajn fingrojn malsupren de la aŭrikloj.


4. Per la pintoj de la dikfingroj de la manoj premu la 5 liniojn faritajn sur la frunto kaj malrapide movu la dikfingrojn laŭ la linioj (Bildo 2). Tiamaniere premu la unuan linion kun la ceteraj fingroj sur ambaŭ flankoj de la kapo kaj post tio faru la samon sur la aliaj linioj. Faru tion sur ĉiu linio po 3-5 fojojn.

5. Frotu la tutan fronton tien kaj reen per la dikfingroj de la manoj.

6. Premfrotu la fronton en la maniero montrita en 3. Per la dikfingroj premu la tempiojn. Per la interna flanko de la 2-a kaj 3-a artikoj de la montraj fingroj premfrotu la akupunkturajn punktojn *toŭuej* kaj du flankojn de la kapo 3-5 fojojn kun la dikfingroj sur la mezlinio de la verto kaj la montraj fingroj ambaŭflanke de la kapo.


7. Per la 5 fingroj kaptetu ĉiujn partojn de la verto.

1. Siĝukong
2. Tempio
3. Ĉengĉji
4. Sibaj
5. Jingŝjang
6. Jujaŭ
7. Zanĝu
8. Jintang
9. Jingming




1

1. Siĝukong
2. Jujaŭ
3. Zanĝu
4. Bajhuj
5. Jintang
6. Toŭuej
7. Tempio



2

1. Fengĉi
2. Fengfu



3

8. Etendu la manojn malsupren de la kapo kaj per la montraj fingroj knedu la akupunkturajn punktojn *fengĉi* (Bildo 3) kaj milde tiru la masaĝatajn korpopartojn supren.

Post la masaĝo la masaĝatoj kredeble sentas agrablecon. La masaĝo estas utila por kvietigo, sobriĝo, sendoloriĝo kaj endormiĝo. ■

en la hospitalo ŝi renkontis akuŝantinon kun granda fetu, kies piedoj prezentiĝis malsupre. Laŭ kutima akuŝiga metodo de la hospitalo, tia akuŝantino devas ricevi cezaran operacion. Sed Lu Xiufang, rigore laŭ la akuŝiga metodo lernita de Zhao Xuefang, ne faris cezaran operacion nek flankan tranĉon, ŝi sukcese akuŝigis ŝin je bebo 4 kg peza. Kaj tuj poste ŝi akuŝigis alian virinon je bebo en transversa kuŝo, 4,5 kg peza. Tio mirigis kuracistinojn kaj flegistinojn de la hospitalo.

Kaj Lu Xiufang fariĝis aganta instruistino anstataŭ lernantino. Poste, la hospitalo sendis du flegistinojn lerni en la ginekologi-obstetrika fakto de la Popola Hospitalo de Changzhi.

Oni ne atendis, ke kuracistinon Zhao Xuefang, kiu laboras pene por savi la vivon de aliaj sub la astra lampo kaj ĉe operacia tablo, senkompate turmentas malsanoj. Komence de 1987 oni diagnozis, ke ŝi suferas de vezika kancero. Post operacio

Zhao Xuefang, ege malforta, daŭre laboris en malsanulejoj. En 1991 ŝi estis diagnozita kiel suferanto de rektuma kancero. Antaŭ ol ricevi la duan operacion, ŝi petis, ke ŝi operaciigu du malsanulojn ĉiutage en sinsekvaj kelke da tagoj. Operaciite, ŝi rifuzis kuŝi en kirurgia malsanula ĉambro, sed persiste eniris en la akuŝologian malsanulejon. Ŝi diris: "Mi estas kuracistinon. Mi ne forlasos mian postenon, kiam mia koro batas." ■

Mark Baber en ĉina malliberejo

EN kvin-etaĝa domo de la malliberejo de Ŝanhajo enkarceriĝas anglo, kiu nomiĝas Mark Baber.

Antaŭ tri jaroj la 28-jara anglo estis kaptita de ĉinaj doganistoj en la Ŝanhaja Internacia Pasaĝerdoko pro tio, ke li kontrabandis narkotaĵojn. Laŭ ĉina leĝo li estis kondamnita al mallibereco de kvar jaroj.

Trapasinte kelkajn jarojn en la malliberejo, altastatura Mark Baber aspektis vigla, kun blonda hararo bonorda kaj en helkolora duonmanika ĉemizo kaj malhelkolora pantalone.

Kiam mi vidis lin, li salutis min en la ĉina lingvo, kiun li lernis en la malliberejo. Sur apuda skribotablo kuŝis la Nova Angla-Ĉina Vortaro kaj aliaj libroj, kaj paperpeco kun linioj da ĉinaj ideogramoj.

Demandite pri la vivo en la malliberejo, Mark diris, ke la medio estas kvietaj kaj la provosoj afablaj. Tie oni povas libere korespondi. Ĉiumonate li korespondas kun siaj parencoj kaj amikoj kelkfoje. Li ŝatas ludi piedpilkon, kureti, legi kaj lerni la ĉinan lingvon. Li plej ŝatas legi la ĵurnalon *"China Daily"*.

Mark tre kontentis pri manĝo en la malliberejo. Li estas vegetarano. Li preferas manĝi farunaĵojn kaj legomon. Oni preparas por Mark specialajn pladojn, kiaj frititaj orelfungoj kaj legomoj, kaj vegetarajn farĉitajn farunaĵojn.

La 11-a de oktobro estas la naskiĝtago de Mark. "Ĉiujare, en la malliberejo oni preparas grandan torton speciale por mia naskiĝtago," Mark diris, "Kiam venas la Kristnasko, ĉinaj policianoj aranĝas

celebradon por ni." Ĉe tio li returnis sin kaj rigardis aliajn malliberulojn alilandajn.

Kiel aliaj malliberuloj, Mark enŝlosiĝis en aparta karcero. Sur la fera pordo klare vidiĝis lia nomo. En la retsako pendanta ĉe la vestoŝranko estis piedpilko. Mark bone ludas piedpilkon. Kelkiam li kaj aliaj malliberuloj kune organiziĝis en teamon el malliberuloj ĉinaj kaj alilandaj kaj konkursis kun teamo de ĉinaj policianoj. Kaj iafaje sur la malgranda piedpilka ludejo li ĵetis pilkon en la golejon 1 m larĝan.

Vintre Mark ŝatas sunumi sin sola kaj somere li preferas lavi sin per malvarma akvo. Ĝenerale, sur larĝa teraso de la domo de la malliberejo li legas librojn kaj ĵurnalojn kaj lernas la ĉinan lingvon.

"Pro kio vi estas en tiu ĉi malliberejo?" mi demandis lin.

"Pro tio, ke mi kontrabandis narkotaĵojn," respondis Mark. Li daŭrigis, "Mi malobservis ĉinan leĝon kaj devas esti punita de ĉina tribunalo."

En 1963 Mark naskiĝis en Britio. Li vivis ĉe Tamizo, lernis en la Oksforda Universitato kaj gajnis bakalaŭrecon. Post diplomigo li okupiĝis pri traduka laboro. Revante pri riĉiĝo, li partoprenis en kontrabandado de narkotaĵoj. Posttagmeze de la 23-a de marto 1991, kiam li estis forlasonta Ĉinion kaj veturonta al Japanio, kun narkotaĵo kun si, ĉinaj doganistoj kaptis lin ĉe la doko.

Mark sentis grandan bedaŭron pro tio. Li diris, ke la ĉinaj juĝistoj montris al li ĝustan vivovoĵon kaj li decidis pentfari per bonkonduco. Mark memvole faris purigan laboron en la malliberejo.

Oficistoj de la Brita Ambasadorejo en Ĉinio kaj Brita Konsulejo en Ŝanhajo estis kelkfoje komisiitaj viziti lin. Ili demandis provoson, ĉu familianoj de Mark povus viziti lin. La respondo estis, ke liaj familianoj povas fari tion unufoje ĉiumonate. Demandite, ĉu la puntempo de Mark povus esti mallongigita, la provoso respondis, ke tio eblas, se Mark bone kondutos en la malliberejo kaj atingos la normon de mallongigo de puntempo.

"Ĉiuj estas egalaj antaŭ la leĝo", tiu ĉi principo enkorpiĝas ankaŭ en reformado de alilandaj malliberuloj. Ĉinio same traktas alilandajn malliberulojn, kiel la siajn. Ankaŭ Mark kaj aliaj devas reformi sin per laborado. Pro tio, ke Mark mal multe laboris antaŭe, oni donis al li kompare malpezan laboron.

Koncerne al la estonteco, li diris: "Mi penas por bone posedi la ĉinan lingvon por poste fari komercadon kun Ĉinio."


S-ro Mai Linhua, ĉefprovoso de la malliberejo, koniĝis al mi, ke ĉiuj alilandaj malliberuloj en la malliberejo estas bone traktataj kaj ilia vivo estas garantiata. ■

Biovenenoj utiligeblaj

VENENAJ serpentoj, araneoj, skolopendroj, skorpioj kaj eĉ venenaj fungoj havas en si venenon mortigan por la homoj. Kun rapida disvolviĝo de la modernaj scienco kaj tekniko biovenenoj estas pli kaj pli atentataj de fakuloj kaj ekuzataj.

Jam en la antikva Ĉinio oni kuracis per biovenenoj, kia serpenta veneno. Nuntempe biovenenoj estas multe uzataj de kuracistoj: Veneno, eltirita el la korpo de formiko, estas uzata por kuraci reŭmatisman artriton, post medicina traktado; veneno de abelo estas uzata ne nur por kuraci bronkiton, reŭmatismen, arteriosklerozon k.a., sed ankaŭ kiel kordialo; toksino, eltirita el la korpo de venena riverfiŝo, estas la plej bona analgeziko de la mondo; enzimo, ekstraktita el la veneno de vipuro, povas solvi fibrinon kaj efikas por kuraci encefalan trombozon, koronarian kormalsanon, brustangoron k.a. Kaj 90% de la suferantoj povas resaniĝi post la kuraco. Usonaj sciencistoj ekspertizis likvaĵon de centoj da venenaj araneoj kaj trovis en ĝi kombinaĵon — antitoksinon kontraŭ glutamata graso. La antitoksino estas uzata por dilui glutamatan grason en homa korpo kaj efikas por kuraci encefalan hemoragion kaj epilepsion.

Sciencistoj donas apartan atenton al la maraj estaĵoj sen memdefenda kapablo. Ili estas senkrustaj kaj malrapide moviĝas, tamen ili ne estas pereigitaj. Pro kio ili povas ekzisti? Pro tio, ke ili sekrecias kemiaĵon por reagi kontraŭ aliaj maraj estaĵoj, kiuj atakas ilin. Nun ĉinaj kaj alilandaj medicinistoj faras eksperimenton pri tiu kemiaĵo por prepari novan medikamenton kontraŭ aids, kancero, parazitozo kaj darto. Ni prenu ruĝan spongon kiel ekzemplon. Ĝi havas en si toksinon, kiu forte inhibicias filtreblan viruson kaj servas kiel specifa medikamento kontraŭ tuberkulozo kaj iuj sangmalsanoj. De la lastaj jaroj nukleozido, eltirita el tia spongo, estas uzata kiel medikamento kontraŭ kancero. Estas alia spongo venena por homo kaj fiŝo. Ĝia veneno ege mortigas ascitan kanceron de muso. Nun sciencistoj penas ŝanĝi la kemian strukturon de la veneno por redukti



Eltiro de serpenta veneno

ĝian forton. Lastatempe sciencistoj malkovris en tria spongo terpenan izocianidon kun aparta strukturo, kiu forte inhibicias stafilokokon, mikobakterion kaj fojnobacilon kaj ludas gravan rolon en medicino.

Utiligo de bioveneno por homa korpo profundigas esploradon de sciencistoj. Nun ni venas al la demando, ĉu oni povas mortigi fiinsektojn per bioveneno el la natura apoteko. Por tio el multaj eksperimentoj naskiĝis novaj teknikoj mortigi fiinsektojn per bioveneno. Svisaj sciencistoj esploris la toksinon de anelidoj en la Hindia Oceano kaj trovis, ke la toksino povas rapide mortigi litcimojn, iksodojn, folilaŭsojn, skarabojn k.a. Sinteze traktinte la toksinon, oni faris el ĝi novan insekticidon, kiu estas efika por mortigi fiinsektojn vivantajn en kampoj de kotonujoj kaj terpoj. Francaj sciencistoj faris serion da kombinitaj insekticidoj el veneno de formikoj. Ili bone efikas por mortigi koleopterojn, iksodojn, muŝojn, tinojn kaj pulojn.

En la naturo, krom bestoj, ankaŭ multaj mikroboj kaj vegetaĵoj havas en la korpo toksinon, kiun oni povas utiligi kiel kuracilon.

Videble, la toksino de venenaj insektoj kaj tiu de venenaj herboj estas neelĉerpeblaj por la homaro. ■

Nova vivo de toksigemuloj

JEN sentoksigejo en Kunming, sudokcidenta Ĉinio.

Ses toksigemuloj senparole sidis antaŭ mi. Tri el ili estis viroj kaj aliaj — virinoj. Laŭ statistiko, la proporcio de viroj kaj virinoj estas 3:1 en la sentoksigejo.

La kutimaĉo de toksigo devnove aperis en Ĉinio en la mezo de la 80-aj jaroj. Profitante la pordmalfermon de landlimaj urboj de Ĉinio, iuj internaciaj vendistoj pri narkotaĵoj intencis preni tiujn urbojn kiel pasejon por vendi narkotaĵojn de la Azia Ora Triangulo, la plej granda narkotaĵ-produktejo en la mondo, en aliaj landoj. Sekve de tio, vendiĝis en Ĉinio narkotaĵoj kontraŭleĝe.

En Ĉinio tio okazis ĉefe en Yunnan, Xinjiang (Ŝingĝjang), Guangdong, Guangxi (Gŭang-

ŝji), Shaanxi (Ŝenŝji), Ningxia (Ningŝja) kaj Sichuan. La lokaj registaroj de tiuj ĉi regionoj mobilizis la tutan socion por batali kontraŭ krimuloj, kiuj kontrabandis, vendis kaj transportis narkotaĵojn, eduki la toksigemulojn kaj starigi sentoksigejojn por forigi la kutimaĉon de toksigemuloj. Inter ili la Sentoksiga Kuraccentro de Kunming, starigita en 1989, estas ŝtata scienc-esplora organizo. La toksigemuloj en la sentoksigejo devas observi la regulojn de normiga administrado, vivi kolektivan vivon kaj ricevi sisteman edukon kaj kuracadon en kombino de psika resanigo kaj kuracado.

En la lasta tagdeko de aprilo 1994 mi vizitis la Sentoksigan Kuraccentron de Kunming.

Ĉe altaj muroj el ruĝaj brikoj ne estis gardostarantoj nek pik-

drata barilo. Gvidate de Zhang Yuzu, estro de la sentoksigejo, mi trairis tra la pordo gardata de administranto kaj vidis, ke la toksigemuloj faras ekzercadon. Plejparto de ili estis junuloj. Sur la apuda pilkoludejo okazis korbopilka matĉo. Grupo da toksigemuloj atenteme rigardis la matĉon, sidante ĉe la piedo de la muro kun sunŝirmilo.

Apud la ludejo estas drogejo, kie prepariĝas la specifa herbo-drogo Sentoksiga Kapsulo 626. Dank' al tiu ĉi sentoksiga medikamento, nemalmultaj toksigemuloj sukcesis liberigi sin de la kutimaĉo.

S-ro Zhang konigis al mi, ke toksigemuloj, memvole aŭ devigite venintaj ĉi tien, devas vivi izole de la socio tri monatojn. Krom esti kuracataj, ili devas partopreni en diversaj kolektivaj aktivadoj, ekz., fari gimnastikan

Horo



En apoteko de sentoksigiloj



ekzercadon, ĉeesti lecionon, lerni sciojn pri malutilo de narkotaĵo kaj koncernajn politikojn kaj ricevi moralan edukadon. Laŭ la aranĝo de la centro ili rigardas filmojn kaj videobendojn pri narkotaĵ-malpermeso, partoprenas balon kaj sin amuzas per programeroj, kreitaj de ili. Ĉio ĉi tio celas, ke ili forlasu la kutimaĉon, intensigu sian konscion pri la leĝo kaj havu memfidon por la nova vivo.

Flanke de la ludejo troviĝas tri-etaĝa domo, kie vivas toksigemuloj. Enirinte ĉambron de la tria etaĝo, mi vidis flegistinon Xiao Wang prizorgantan toksigemulinon, kiu venis al la centro antaŭ kvar tagoj. Tiu ĉi pala fraŭlino kun malviglaj okuloj estis ricevanta vejnan injektadon kuŝante en la lito.

“Pro kio vi ektoksiĝis?”

“Pro scivolemo. Antaŭ du jaroj mi provis toksigon sub la propono de mia amiko kaj poste mi ekhavis la emon.”

“Narkotaĵo multe kostas. Kiel vi akiris tiom da mono?”

“Mi faris konfekcian komercadon kaj por toksigo mi forkonsumis, kiom mi enspezis.”

La malforta fraŭlino babilis kun mi. Demandite, ĉu ŝi havas

memfidon por sentoksiĝi, ŝi kapjesis. La flegistino diris al mi, ke fakte sentoksiĝo ne estas facila. Iu kuracisto fumis heroinon por havi personan sperton kaj per tio averti aliajn kontraŭ toksigemo. Unuafoje li multe suferis, duafoje li sentis agrablecon kaj poste, li perdis sian profesion rezistemon. Li memvole venis al la sentoksigejo por devige sentoksiĝi.

En la centro toksigemulinaj rifuzis esti fotitaj, tamen ili konsentis fotiĝi kune kun mi. Ili diris, ke ili multe suferis la unuajn tagojn post la alveno al la sentoksigejo. Ĉirkaŭ dek tagojn post kiam ili prenis sentoksigan kapsulojn, ili sentis sin bone. Nun ili jam resaniĝis. Dank’ al la regula vivo, apetita manĝo, komforta loĝado kaj agrabla amuzo, ili ĉiuj pligrasiĝis.

La nuna sentoksigo farata en la sentoksigejo nomiĝas klinika dekutimigo medicine. Tio ne signifas kompletan sentoksigon. Oni devas persisti en sentoksigo dum sufiĉe longa tempo por absolute ne dependi de narkotaĵo. La toksigemuloj devas foriri de la sentoksigejo, akompanate de siaj familianoj. La familianoj kaj ilia labororganizo devas subskribi kontrakton pri edukado al la toksigemuloj, por ke ili ne toksigu denove.

La efika sentoksigo kaj racia administrado de la sentoksigejo allogis ankaŭ 16 toksigemulojn el Hongkong kaj Tajvan. S-ro Wang Jingquan (Ŭang Ĝingĉjŭan) el Hongkong toksigiĝis jam de 40 jaroj kaj sukcesis forlasi la malbonan emon en la sentoksigejo. Raportistoj de la Hongkong-a “Ĉiutaga Ĵurnalo” rigardis tion mirindaĵo.

Vizitinte la sentoksigejon en Kunming, oficisto de Programo pri Narkotaĵ-malpermeso de UN kaj la unua vicurbestro de Zuriko, Svisio, havis tre bonan impreson pri ĝi kaj la lasta deziris plifortigi sentoksigan kunlaboron inter Svisio kaj Ĉinio. ■

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: Du internaciaj respondkuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizoj kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

AREinaldo Marcelo Ferreira, 19-j., dez. kor. tm. pri diversaj temoj. Adr.: Rua das Papoulas, 143 Cecap, BR-19065-390 Presidente Prudente, SP, Brazilo.


*S-ino Tao Xueling dez. kor. tm. Adr.: p/a Esperanto-Asocio de Kunshan, CN-215300 Kunshan, Jiangsu, Ĉinio.

*Mi volas kor. kun viroj aŭ virinoj. Mi kolektas monerojn. Mia adreso: Juho Ilmari Vattulainen, Rantakyläntie 64, 81160 Romppala, Finnlando.

*Jaroslav Janiak dez. kor. tm. pri arkeologio, etnologio, religioj kaj popola kulturo. Adr.: str. Lubeckiego 14 m. 30, PL-91-403 Lodz, Pollando.

*44-j. arbokultura inĝeniero dez. kor. kaj kolektas bildkartojn. Adr.: Vasilij Ribakok, Do Vostrebovanija, 613100 Slobodskoj, Kirovskaja Obl., Rusio.

*Ukrainia GŜ-klubo invitas amatorojn de ŝako, damoj, othello, ĉina ŝako por korespondludi. Pli detala informo por 1 IRK. Aleksandr Salnikov, ab/ja 5, 349700 Staĥanov, Luganskaja Obl., Ukrainio.



PIAO KANGPING:

PLUVO SUDĈINIA

Ja kiom da ĉagreno vin turmentas?

Ĉu vi ne povus verŝi al mi ĉion?

*Ne kun knabina honto kaj sinĝeno
senĉese zumu tage-nokte l' larman melo-
dion!*

*Ĉu plaĉus al vi treni ankaŭ min en marĉon,
ke suferadu mi malsekan memor-ŝarĝon,
ke l' tagoj nasku nur nenion?*

*Ne, ne similas ĝi al Nordo mia,
ĉar tie ofte l' suno brilas kaj sonoras rido
sunradia,
simila al montaro, stepo kaj Gobio,
senlime vasta, ĉio ĉio!*

*Eĉ se malĝojo kaj ĉagreno ĉenas,
tiam potenca tondro tra l' ĉiel' promenas
kaj forta pluvo ploras por ter-skui,
forlavi tiel la tristan emocion.
En palpebrumo ree brilos arda lumo...*

— *Ĝojego tondra! Tristo drasta! Verva!*

Senrezerva!

*Jen la naturo kruda de l' hejmland' mal-
suda.*

Neniom vi simila...

*Senlime morna kaj melankolia,
subtila, svelta, intermita kaj gracia
murmuras kaj susuras, kaj murmuradas kaj
susuras...*

ho, pluvo sudĉinia!

Ĉu ne sufiĉe longas niaj ploroj historiaj?

Ĉu ne montege multas farendaĵoj niaj?

Vian sentimentalan belon mi nur povas

*miri,
do, nun mi povas nur foriri...*

Mi devas tuj rapidi al la Nordo mia.

Aŭskultu, ĝi vokadas min animoskue.

Adiaŭ, pluvo sudĉinia!

(Elĉinigis LAŬLUM)

Sentencoj de Guan Zhong

Guan Zhong estis fama politikisto kaj pensulo de Ĉinio en la 7-a jc a.K. Genia kaj talenta, li estis rekomendita kiel suvereno de Qi-regno. Li alprenis serion da ĝustaj politikoj, kiaj disvolvo de sala kaj fera industrioj, reordigo de prezoj kaj starigo de racia imposta sistemo, kio rimarkinde pligrandigis la nacian forton. Dank' al tio, Qi-regno fariĝis la plej potenca siatempe.

Abundo da greno konas ĝentilon,
Sufiĉo da vestoj konas la dignon.

Tro da malpermesoj ne kondukas al sukceso,
Tro da dekretoj ne donas rikolton.

Senkonsileco embarasigas,
Senprepareco ne sukcesigas.

Distremon akompanas ĉagreniĝo,
Frandemon maldiskreto.

Saĝuloj sin regas per disciplino,
Se ne, ili ne fariĝos bonkonduktaj.

Plendo naskiĝas el kulpo.

Bona konsilo malpli taŭgas ol bona ŝanco.

Kiam la suno staras plej alte, ĝi jam komencas
oblikvi,
Kiam la luno estas plej ronda, ĝi jam komencas
malkreski.

Pensemo vekas saĝon,
Senpensemo malĝojon.

Io ŝajne facila fariĝas malfacila,
Io ŝajne malfacila fariĝas facila.

MEM PROVU

OFTA TETRINKADO KONTRAŬSENILA

Vitamino E estas konata kiel unu el la ĉefaj faktoroj kontraŭ senileco. Ĝi protektas ĉelan kromosomon kiel kontraŭoksidilo. En eksperimento sciencistoj trovis, ke polifenolo enhavata en teo estas forta kontraŭoksidilo, kiu nebligas al libera radikalo difekti la ĉelojn, efike inhibicias la mutacion de ĉeloj kaj plifortigas imunan povon de la ĉeloj. Tial ofta trinkado de teo, precipe de verda teo, helpas kontraŭsenilecon.

POR PROTEKTI LA DENTOJN

Por laŭplaĉe manĝi en la maljuneco oni devas bone protekti siajn dentojn. Kion fari por tio? Oni devas teni la dentojn en pureco, gargari la buŝon post manĝo kaj brosi la dentojn antaŭ enlitiĝo kaj post ellitiĝo. Se oni persistas en forta kunpremado de la dentoj ĉe urinado aŭ fekado, la dentoj estos sanaj. Kaj ofta kunfrapado de la dentoj kun buŝo fermita

estas utila por protekti la dentojn.

SANIGA RETROIADO

Retroirado estas saniga kaj bonefika por kuraci lumbalgion.

Retroirado regule streĉas kaj malstreĉas la psoason, tiel ke pliboniĝas la sangocirkulado, plifortiĝas la funkcio de la psoaso kaj latisimo kaj stabiliĝas la spino. Masaĝado de la lumboj dum retroirado plifortigas la renojn kaj lumbojn.

Mezaĝuloj kaj maljunuloj, suferantaj de psoasa lezo, lumbalgio kaj lumba doloreto, povus provi tion matene kaj vespere, po 20 minutoj ĉiufoje.

SENDOLORIGA METODO POR BRULVUNDITO

Suferante de negrava brulvundo, ĝenerale oni uzas medicinaĵon por kuraci ĝin. Iuj tremas la vunditan korpoparton en bovina lakto, kio estas sendoloriga kaj kontraŭinflama.



Ludo de naciaj instrumentoj

Ludo de bivo



Floras nacia

Fotoj de HAN HONG

Por vigligi la nacian kulturon kaj nacian muzikon, antaŭ nelonge la Pekina Geknaba Domo okazigis la 10-an Konkurson de Ludo de Naciaj Instrumentoj, en kiu partoprenis 1 000 geknaboj el infanĝardenoj, elementaj kaj mezaj lernejoj de Pekino, el kiuj la plej juna estis 4-jara.

La konkurso estis subtenata de la publiko kaj precipe de muzikistoj de naciaj instrumentoj, kiuj volonte okazigis kursojn de nacia muziko kaj ĝian prezentadon.



Ludo de ĝeng-oj

muziko



Liu Kun, gajninto de la unua premio de solludo de fluto

Xing Lu, gajninto de la unua premio de solludo de kordinstrumento *erhu*



La kursoj kaj konkurso rikoltis sukcesojn en popularigo de scioj pri muziko de naciaj instrumentoj, prosperigo de nacia muziko kaj kulturo de muzikaj kapabluloj. La muzika nivelo de la konkursantoj evidente leviĝis. Fakuloj alte taksis la aktivadon. Dank' al la konkurso pli ol 50 geknaboj estis akceptitaj de fakaj lernejoj.

Ŝtala uzino revivi- ĝinta sur ruino



Teknikistoj de la kompanio

EN 1983 la ŝtala uzino de Tai'an ĉe la montpiedo de Taishan-provinco bankrotis pro terura defcito. Ĉiuj posedaĵoj de la uzino estis venditaj, krom 2 altfornoj ne disrompeblaj nek vendeblaj kaj tero kovrita de herbo. Plejparto de la laboristoj kaj oficistoj de la uzino foriris pro senlaboreco.

Vizaĝe al la dezerto la restintaj laboristoj larmis, tamen iliaj larmoj ne estingis la esperon en ilia koro, ke ili denove hejtu la altfornojn. "Restarigi produkta-

don estas nura sonĝo", la diro ne estis senbaza. Ĉar eĉ la tiama urba magistrato opiniis, ke fabrikestroj komisiitaj de ĝi estis tre kapablaj, sed ili ne sukcesis savi la fabrikon; ĉu estus iu pli kapabla ol ili?

Jes, tia homo estas Wang Shoudong. Antaŭ ol la fabriko bankrotis, li funkciis kiel estro de iu laborejo. Bone pripensinte, li petis restarigi produkton. Sub lia gvido la nesubigeblaj laboristoj venkis multajn malfacilojn, kaj fine kreis novan vivoplanan ŝtalan entreprenon — Ĝeneralan Ŝtalan Kompanion de Tai-

shan.

La koncerna supera departemento sankciis la petskribon de Wang Shoudong pri restarigo de produktado kaj samtempe diris al li, ke la registaro kaj banko ne donas al li krediton. Nur riparado de unu altforno bezonis 3 milionojn da juanoj. Kie akiri la monon? Wang Shoudong bone sciis, ke la defcito de la entrepreno estas kaŭzita ĉefe de la planizita ekonomio, ke nur merkata ekonomio povos savi la uzinon. Li 5-foje veturis al Ŝanhajo. Lia sincereco fine kortuŝis la Ŝanhajan Metalurgian Buroon kaj tiu konsentis prunte doni al li 3 milionojn da juanoj en maniero de kompensa komerco. Tiel la entrepreno akiris la unuan startan kapitalon. 105 tagojn poste la unua altforno kun kapacito de 55 kubmetroj ekfunkciis kaj la uzino profitis 530 000 juanojn en la jaro. En la sekvanta jaro la alia 55-kubmetra altforno ekproduktis. En la tria jaro konstruado de 100-kubmetra altforno estis komencita. Dank' al la tri altfornoj la jara produktopovo de krudfero de la kompanio atingis 200 000 tunojn. En la sekvantaj kelke da jaroj la entrepreno antaŭenmarŝis per la jara averaĝa kresko de 68.1%.

Menciante la konstruon de la 100-kubmetra altforno, la laboristoj de la kompanio havas apartan senton. Tiam Ĉinio estis reduktanta investadon, kaj krudfera merkato depresiis. Multaj ne komprenis, kial la kompanio decidis konstrui altfornon en la malfavora situacio. Tamen, la kompanio ĝuste antaŭvidis la bonan perspektivon de krudfera merkato kaj decidis komenci konstruadon en la difinita dato. La sekvantan jaron la prezo de krudfero releviĝis, kio koincidis kun la komenciĝo de produktado de la altforno.

Antaŭtempa konscio de la kompanio de Taishan multe helpis la gvidantojn en la intensa

Monkolekto por Fondaĵo EPĈ-abono

Pro altiĝo de la kostoj de eldonado kaj sendado de "El Popola Ĉinio" ni reguligas de la pasinta jaro la abonkotizon kiel jene: la jara abono (inkluzive de sendokostoj) por la evoluantaj landoj kaj evoluantaj landoj respektive estas 26,00 kaj 14,40 usonaj dolaroj aŭ egalvaloraj valutoj ŝanĝeblaj en usonajn dolarojn. Pro tio la plejmulto de niaj legantoj en la orienteŭropaj landoj, la Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj kaj la evoluantaj landoj, kiuj havas grandan malfacilon en ekonomio, ne povas plu abonon nian revuon. La reduktiĝo de abonantoj pli altigis la produktokoston de nia revuo kaj devigis nin malpliigi ekde ĉi tiu numero la kolorajn bildojn. Ĉi tie ni petas de niaj legantoj komprene mon kaj pardonon.

Konsiderante ilian fortan

deziron daŭre legi nian revuon, ni decidis establi FONDAĴON EPĈ-ABONO, per kiu ni pagos la abonkotizon por iuj malnovaj legantoj kaj esperantistaj aktivuloj de la supre menciitaj landoj. Ni elprenos parton de la rentumo de Ghiselin-Fondaĵo de "El Popola Ĉinio" kiel bazan monsumon de FONDAĴO EPĈ-ABONO. (Tio tute konformas al la deziro de la belga samideano Charles Ghiselin, kiu testamentis, ke lia heredaĵo al EPĈ estu uzata por disvolvo de Esperanto.) Samtempe ni kore petas, ke esperantistoj de la landoj kun bonaj ekonomiaj kondiĉoj monoforu al FONDAĴO EPĈ-ABONO por helpi la nepagipovajn samideanojn. Bonvenas eĉ malgranda sumo. Ni ĉiujare aperigos en nia revuo la nomon kaj ofersumon de ĉiuj donacintoj. Helpemuloj bonvolu sen-

di monon (usonajn dolarojn aŭ valutojn ŝanĝeblajn en usonajn dolarojn) al la konto A/C No. 71411749 je la nomo From People China (El Popola Ĉinio) ĉe Bank of China (Banko de Ĉinio). La adreso de la Banko de Ĉinio estas: Fuchengmennei Dajie, CN-100818 Beijing, Ĉinio. Sendante monon, bonvolu sciigi al ni pri la celo de la oferita mono kun kopio de la banka ĉeko. Oni povas sendi ankaŭ monbiletojn (usonajn dolarojn aŭ valutojn ŝanĝeblajn en usonajn dolarojn) rekte al ni en registrita koverto. La adreso estas: El Popola Ĉinio, P.O. kesto 77, CN-100037, Beijing, Ĉinio.

Antaŭdankon pro via konsidero kaj monofero al FONDAĴO EPĈ-ABONO!

La Red.

merkata konkurenco. La kompanio akcentas teknikan reformadon por sin antaŭenpuŝi. En 1987 oni informiĝis, ke oni projektis novan aglomerilon kaj estis serĉanta fabrikanton. Nemalmultaj fabrikantoj rifuzis fari tion pro granda elspezo kaj malfacileco. Sed la ŝtala kompanio de Taishan senhezite konsentis provfaron. Post unu jaro naskiĝis la unua 16-kvadratmetra ringforma aglomerilo en Ĉinio. Dank' al ĝia sukcesa farado la nivelo de prilaborado de krudmaterialo de la kompanio saltis de aglomerado en malmoderna metodo de la 50-aj jaroj al internacie avangarda nivelo de la 80-aj jaroj. En 1991 la kompanio rekonstruis la unuan altfor-

non, ĝia kapacito kreskis de 55 kubmetroj al 84 kubmetroj, kaj estas aplikataj 7 novaj teknologioj por la fornego, kiaj ŝarĝfaŭko regata per mikrokomputero kaj hidraŭlika supro de altforno.

Proverbo diras, ke unuanima kolektivo formovas Taishanmonton. Oni atribuas la sukceson de la ŝtala kompanio de Taishan al la homa faktoro. La kompanio pli frue ol aliaj fabrikoj praktikis promocian sistemon de siaj laborantoj. Tio multe stimulis la aktivecon de la 5 000 laboristoj kaj oficistoj de la kompanio. La devizo "fideleco, honesteco kaj kunlaboro" iniciatita de la kompanio donis fortan koheremon al la kompa-

nio.

La nuna Ĝenerala Ŝtala Kompanio de Taishan faras novajn progresojn. En 1990 la kompanio fondis laminatejon kun jara produktokvanto de 150 000 tunoj da ŝtalaĵoj, investitan de la kompanio kaj Pacifika Industria Limigita Kompanio de Usono. Poste la kompanio kaj filipina kompanio komencis vendadon de aŭtomobiloj. La totala fiksa kapitalo de la kompanio jam kreskis de 3.92 milionoj da janoj al 250 milionoj da janoj. Antaŭe la kompanio nur povis fandi krudferon, nun ĝi entreprenas pri kemi-industrio, konstru-materialoj, prilaborado de maŝinoj, transportado ktp. La kompanio strebas por fariĝi granda translanda ŝtala kombinato. ■



Xiamen-pontego, la unua transmara ponto de Ĉinio

EKONOMIO

● Antaŭ la fino de 1993 en Ĉinio malfermiĝis soseoj 1.08 milionojn da km longaj, el kiuj la ekspresaj aŭtovojoj superis mil km. Ĉiuj gubernioj, urboj, 97% de la urbetoj kaj 78% de la administraj vilaĝoj de la lando estas atingeblaj per aŭtovojoj. Estas konstruitaj 180 000 modernaj pontoj kaj pli ol 8 milionoj da civilaj aŭtoj.

Ĉinaj ĉemaraj havenoj montris sian novan aspekton. Estas ĉ. 340 ankrejoj, kie povas ankriĝi pli-ol-10 000-tonelaj ŝipoj, kaj 107 havenoj malfermiĝis al la eksterlando. La enlandaj akvovojoj longas 110 000 km. Nun Ĉinio havas internacian martransportan floton kun ŝarĝkapablo de pli ol 20 milionoj da tunoj.

● Jam komenciĝis la konstruado de akvoutiliga pivoto Xiaolangdi sur la Flava Rivero, je 40 km norde de la urbo Luoyang en Henan-provinco.

La konstruo Xiaolangdi funkcios ĉefe por preventi inundon, redukti la minacon de glacia fluo kaj ŝlimo, i.a. liveri akvon, irigacii kampojn kaj produkti elektron. Post sia plenumiĝo la konstruo povos altigi la inund-preventajn normojn, forigi la minacon de inundo kaj glacia fluo kaj redukti sedimenton en la malsupra parto de la Flava Rivero. Ĝia elektrejo kun generatora kapacito de 1.8 milionoj da kilovattoj produktos ĉiujare 5.1 miliardojn da kWh da elektro.

Jam okazis la ceremonio por subskribi la internacian adjudikan kontrakton pri la konstruado. La adjudikanto proponis prezon de 7.3 miliardoj da juanoj. Laŭ la plano antaŭ la fino de 1997 oni interrompos la fluon, antaŭ 2000 du generatoroj ekproduktos elektron kaj en 2001 la tuta konstruo plenumiĝos.

● La fremdaj valutoj rezervitaj de Ĉinio en la unua duono de 1994 pliiĝis je 50%, nome de 21.2 miliardoj da usonaj dolaroj ĉe la komenco de la jaro al 31.8 miliardoj da usonaj dolaroj ĉe la fino de junio. Tio estas senprecedenca en Ĉinio.

KULTURO

● Oni komencis kompili la grandan antikvan libron "Si Ku Quan Shu Kompletigita".

"Si Ku Quan Shu", kompilita en Qing-dinastio (1644-1911), ampleksas gravajn verkojn antaŭ Qing-dinastio, tamen iuj eminentaj

verkoj, precipe akademias kaj kulturaj atingoj post la meza periodo de la 18-a jarcento, ne povus esti enmetitaj. "Si Ku Quan Shu Kompletigita" enhavas, krom "Si Ku Quan Shu", ankaŭ ĉiujn klasikajn verkojn eldonitajn antaŭ la Revolucio de 1911. Surbaze de ĝenerala esploro en la lando, la kompila komisiono elektis ĉ. 5 000 verkojn, kiuj havas gravan akademian kaj eldonan valoron. La libraro, 1.5-oble pli granda ol "Si Ku Quang Shu", komplete eldoniĝos en 4 jaroj.

ARKEOLOGIO

● Kokexili ĉe la limo inter Qinghai, Tibeto kaj Xinjiang kun areo de 82 000 kvadrataj kilometroj estas mistera, frosta kaj senhoma regiono, kie mankas oksigeno. Lastatempe fakuloj, ekspertizinte 9 ŝtonajn instrumentojn elfositajn ĉe Wulanwula-lago de Qinghai, konstatis, ke ili estas restaĵoj de la antikvuloj de la malfrua paleolitiko antaŭ 20 000 jaroj. Laŭ la esploro pri la klimata ŝanĝiĝo de la regiono, oni povas scii, ke antaŭ 20 000 jaroj tie regis malseka klimato kaj sur la stepo prosperis fiŝkaptado kaj ĉasado.

● En Bahe-urbeto de Xi'an, nordokcidenta Ĉinio, estis malkovrita lastatempe ruino de antikva ponto, ekkonstruita en la jaro 583. La ŝtona ponto kun multaj arkaĵoj longas je centoj da m kaj estis science strukturita. Oni elfosis unue 20-metran parton de la ponto. Ĝi konstruiĝis pli frue ol la fama ŝtona ponto de Zhaozhou kun unu arkaĵo en norda Ĉinio, konstruita en 590-608.

SCIENCO KAJ TEKNIKO

● La 21-an de julio ĉi-jare, en la satelita lanĉejo Xichang de Sichuan-provinco, Ĉinio, la transporta raketo Changzheng n-ro 3 sukcese portis telekomunikacian sateliton "Azio kaj Pacifiko" n-ro 1 en difini-

tan orbiton. Antaŭ tio, Ĉinio jam sukcese sendis 7 satelitojn en la spacon.

La satelito, produktita de la usona Hughes-kompanio, apartenas al la Azia kaj Pacifika Kompanio de Telekomunika Satelito de Hongkong. Oni informis, ke la 28-an de aŭgusto 1994 Ĉinio sukcese lanĉis Aussat B3, pri kiu Ĉinio kontraktis kun alia lando, kaj la sateliton "Azio kaj Pacifiko" n-ro 2 Ĉinio lanĉos antaŭ la fino de tiu ĉi jaro.

● Ĉinio havas plej abundajn raraterajn riĉfontojn en la mondo kun mineraloj de ĉiuj specoj, kiaj bastnazito, monazito, ksenotimo kaj jona erco, malofte vidata en la mondo.

Rara tero ludas apartan rolon en la altteknika kampo, tial multaj landoj enlistigis raran teron en gravajn riĉfontojn kun strategia signifo. En 1993 Ĉinio konsumis 9 890 tunojn da rara tero, eksportis 12 740 tunojn da rara tero kaj produktis pli ol 300 000 raraterajn magneto-maŝinojn. Dank' al sia sukceso de esplorado kaj produktado de rara tero Ĉinio povas disvolvi la avantaĝojn de rara tero, sekvante la internacian altteknikan merkaton.

TURISMO

● Ĉinio komencis ekspluati Zongshan kaj Pala-bienon, unuarangajn historiajn restaĵojn protektatajn de la ŝtato, en Gyaze-gubernio de la Tibeta Aŭtonoma Regiono.

Zongshan, kie rezidis la loka registaro de la malnova Tibeto ekde la dinastio de Tubo-regno kaj kie okazis la fama batalo de la ĉina nacio kontraŭ britaj invadantoj fine de la 19-a jc. kaj komence de la 20-a jc. Pala-bieno estas tipa kaj bone konservita bieno, konstruita en la lasta periodo de la feŭda servuta socio de Tibeto. La du vidindejoj kune kun Potala-palaco de Lhasa kaj la templo Zashilunbu en Xigaze formis originalan turisman lokon kaj malfermis novan fenestron al la mondo por koni Tibeton.

● Antaŭ nelonge kulturaj diplomatoj en Ĉinio el 28 landoj de Azio, Eŭropo kaj Afriko veturis al Wuqiao-gubernio, akrobata lulilo de Hebei-provinco, kie ili vizitis la Akrobatan Mondon. Post sia malfermiĝo al la eksterlando en novembro 1993 la Akrobata Mondo akceptis jam pli ol 100 000 turistojn en- kaj eksterlandajn.

MEDIPROTEKTADO

● Antaŭ nelonge dek arte reproduktitaj ruĝvertaj grupoj, raraj en la mondo, estis transpor-




Ekspluatado de rara tero en Bayan Obo de Ĉinio

titaj de Shenyang en nordorienta Ĉinio al Nov-Jorko por fiksloĝigi. La zoo de Shenyang reproduktis 101 ruĝvertajn grupojn en 1989-1993.

ŜTONA KAVERNO MALOFTE VIDEBLA

● En monto de Guangnan-gubernio, Yunnan-provinco, troviĝas profundega ŝtona kaverno kun areo de miloj da kvadrataj metroj, kie loĝas 54 familioj el 280 kamparanoj. Ili sane vivas en harmonio kaj ne havas edziĝo-ligon inter la proksimaj parencoj, konservante la antikvan moron. En la kaverno funkcias elementa lernejo, kie tage lernas geknaboj kaj vespere iuj plenaĝuloj de la vilaĝo.



Ĉina baritonulo Yuan Chenye gajnis la unuan lokon en internacia voĉmuzika konkurso memore al P. I. Ĉajkovskij.



Farado de kokosaj gravuraĵoj

METIARTAĴOJ

Kokosa skulpturo

Teksto de LU CHUANZHEN

Fotoj de YAN JIN

KUN aparta stilo kaj intensaj lokaj koloroj diversaj kokosaj skulptaĵoj estas konataj kiel popolaj metiartaĵoj propraj al Hainan-insulo de Ĉinio.

Kokosaj skulptaĵoj estas faritaj el kokosaj ŝeloj briletaj, delikatvejnaj kaj glataj. Dank' al siaj trajtoj kaj natura formo, kokosaj ŝeloj pitoreskigas la skulptaĵojn kaj donas superban efektan.

La skulpta prosedo konsistas el elekto de materialo, formigo, skulptado, inkrustado, polurado, ornamado k.a. Antaŭ ĉio oni devas elekti kokosajn ŝelojn, poluri ilin, fari formigon kaj kunmeti ilin, poste, fari skulptadon laŭ la desegno kaj fine skizi la skulptaĵon per ora aŭ arĝenta pulvoro antaŭ ol laki ĝin. Estas diversaj manieroj de kokosa skulptado, kiel ekzemple, inkrustado, kungluado, amasigado, gravurado, reliefigado kaj aĵurado. Por fari kokosan skulptaĵon pli grandan ol natura kokosa ŝelo, oni bezonas kolekti centojn aŭ eĉ pli ol milon da kokosaj ŝelpecoj. Por versimiligi kokosajn skulptaĵojn oni uzas plurajn teknikojn. La kokosaj skulptaĵoj de Hainan estas multspecaj. Ili estas reliefigitaj, plektitaj, marketritaj k.a.

Per kokosaj skulptaĵoj oni prezentas homojn, pejzaĝojn, florojn kaj bestojn. Ni prenu kiel ekzemplojn amindan kokosvilaĝan knabinon, stultan porkidon, komikan simion kaj grandan

florvazon. Ili ĉiuj estas ĉarmaj kaj gustoplenaj. Nun oni produktas pli ol 300 specojn de kokosaj skulptaĵoj, kiaj delikataj fruktopletoj, bovloj, florvazoj, tablolampoj, pokaloj kaj altklasaj ekranoj.

La kokosaj skulptaĵoj estas metiartaĵoj praktikaj kaj aprecaj. Antaŭ milo da jaroj Hainananoj faris el kokosaj ŝeloj ujojn por ĉiutaga vivo. La tiamaj ordinaraj kokosaj kuleroj, bovloj, vazoj, brosoj kaj ĉerpiloj ĉiuj estis delikataj metiartaĵoj. Poste, kun la progreso de skulpturo kaj altiĝo de vivnivelo, la kokosaj skulptaĵoj disvolviĝis de simplaj uzaĵoj de la vivo al aprecaj metiartaĵoj. Tiel, krom la supre diritaj, estas ankaŭ altklasaj kokosaj artaĵoj pri homoj kaj bestoj kaj murskulptaĵoj.

Kiel vilaĝo de kokosaj skulptaĵoj, Fudao de la urbeto Longqiao (Longĉjaŭ), Qiongshan-(Ĉjongŝan)-gubernio, kun historio de kokosa skulptado dum pli ol 300 jaroj, havas 20 familiojn. Ili ĉiuj majstras en kokosa skulptado. La maljuna metiartisto Wen Bide prezentis sian arton en Pekino kaj gajnis premion. En la vilaĝo oni persistas en la tradicia moro, ke majstro transdonas la metiarton al siaj lernantoj. Aperis novgeneraciaj metiartistoj, precipe nombro da metiartistinoj.

Por disvastigi la teknikon de kokosa skulptado en la mondo, Wenchang-aj skulptistoj de Haikou, Hainan-provinco, okazigis kurson de kokosa skulpturo en Dominikio kaj Tanzanio. ■



Kapo de knabino



Simio




Drakkapa vazo

Kokosaj vazoj



FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ

Dometo en arbaro
de **SLAWOMIR
RUSZKIEWICZ**
(Pollando)



Sur monto de **SLAWOMIR RUSZKIEWICZ** (Pollando)



ISSN 0032-4361



世界语《中国报道》一九九四年第十一期
(本刊代号: 二—九—一五) 国内统一刊号: CN11 1339 / G2